Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
Jarkolekto 26 - trimonata

4/96

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

Redaktoro: Jozefo NÉMETH

Vicredaktoro: Katalin SMIDÉLIUSZ

Kunlaborantoj: Stefan MacGILL, Johano KIRSCH, Françoise NOIREAU, Atilio ORELLANA ROJAS kaj Franz-Georg RÖSSLER

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): R. Willeman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende

IPR

Redaktejo: NÉMETH József
HU-8500 Pápa, Kilián ltp. 75/9
☎ + 36-89-315-836

Presado: Flandra Esperanto Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

EL LA ENHAVO

Gabriella Horváth: La historio de IPR 1
El la landoj kaj sekcioj 4
Mireille Grosjean: *Johann Heinrich Pestalozzi* 10
Katarína Bodnárová: *Survoje al Cseh-instruisteco* 12
Konferenca regularo de ILEI 14
31-a ILEI-Konferenco (Aliĝilo) 17
Kent Jones: *Enkonduko de Esperanto en usonajn lernejojn* 21
Esperanto, pasporto al la tuta mondo (Lusi C. Harmon) 23
Recenzoj (Holland, MacGill, Smidéliusz) 24
Reagoj (Horst-Kolinska, Declerck, Armadans í Marfá) 28
Ni kondolencas († *Mirko Emerico Marcetta, Ada Fighiera-Sikorska*) 32
Financa raporto de ILEI 34

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: d-ro Duncan Charters, 25 Elsah Hills Drive, Elsah, IL 62028-9750 Usono; tel. 1-618-374-2453, fakso: 1-618-374-5122. Internet: charters@csc1.prin.edu. *Kunordigo, instruista trejnado.*

Vicprezidanto: Brunetto Casini, Casella Postale 213, IT-56100 Pisa, Italio tel. 39 50/48 670, fakso 39 50/50 05 85. *Planado.*

Sekretario: Marija Beloševiĉ, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio. Tel. (385 1) 576092. Internet: marija.belosevic@public.srce.hr. *Landaj sekcioj, membro-varbado, rilatoj kun UEA kaj la movado, servoj al instruistoj.*

Kasisto: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby. Tel. (46 415) 501 52. *Financo, konferencaj financoj. Membraro.*

Vic-sekretario: Prof. Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., Huazhong Normnal Univ., CN-430070 Wuhan, Ĉinio. *Azia agado, ekzamenoj en Ĉinio kaj Azio.*

Membro: Mag. Atilio Orellana Rojas, Casilla de Correo 1428, AR-5000 Córdoba, Argentino. Tel. kaj fakso +54-51-520065. *Konferencoj, ekzamenoj.*

Membro: Raymond Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende, Belgio, Tel. (32 59) 502708. *Eksteraj rilatoj.*

Estrara komisiito: Prof. Ronald J. Glossop, 8894 Berkay Ave., Jennings, MO 63136, Usono. Tel. (314) 869-2303. *Instruado de infanoj.*

Estrara komisiito: Zsuzsa Barcsay, Bem Rakpart 25/B, HU-1011 Budapest, Hungario. Tel. (36 1) 201-2342. *Gimnazio de ILEI, trejnado de instruistoj.*

Estrara komisiito: Stefan MacGill, Fácán köz 9/2, HU-2030 Érd, Hungario. *Eldonado*

Observanto (UEA): Renée Triolle, 4 impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio

Gabriella Horváth:

Analizado de la periodaĵo IPR kaj indeksoj de ĝiaj jarkolektoj 1-25 (1970-1995).

NdlR - Nia redakcio ricevis kopion de pli ol centpaĝa diplomlaboraĵo kun la supra titolo. La verkinto estas studentino de la Universitato ELTE en Budapeŝto. Ŝi ellaboris sian studon sub la faka gvido de s-ino Zsuzsa Barcsay, estrara komisiito de ILEI.

Fragmentoj el la Enkonduko: „La revuo celas informi la esperantistajn instruistojn pri teoriaj, pedagogiaj, metodikaj novaĵoj, praktikaj spertoj, kaj krome ĝi enhavas informojn kaj pri pedagogiaj aranĝoj kaj pri organizaj aferoj de ILEI. IPR estas grava revuo, efektive la unika revuo, kiu povas helpi la oftan interkomunikadon inter esperantistaj instruistoj en la tuta mondo [...] Kaj ĝi helpas la praktikantajn instruistojn - kiuj instruas studobjekton esperantlingve - en la instruprocezo: ili povas trovi ankaŭ praktikajn konsilojn: ekzercojn, priskribojn pri instrumetodoj kaj instruhelpiloj. Do, ĉi tiu enhave kolora revuo iom substituas la mankon de modernaj, instrumetodaj verkoj, kaj ĝi servas kiel pliperfektigo-ebleco de la instruistoj ankaŭ en tiuj landoj, kie cetere la metodologiaj verkoj (ekz. tiuj de Rakuŝa, Szerdahelyi, Szanser ktp.) ne estas je la dispono de esperantistaj instruistoj ."

Nun sekvu la unua ĉapitro de la diplomlaboraĵo:

Gabriella Horváth: La historio de IPR

Ĉi tiu revuo estas eldonata ekde 1970. Sed al la historio de la nuna IPR apartenas ankoraŭ aliaj revuo-antaŭaĵoj. La pli aĝaj esperantistoj eble memoras pri la pli fruaj jarkolektoj de IPR.

IPR travivis jam tri periodojn, kaj ĝi estis ĉiam la organo de la ĉiama asocio de esperantistaj instruistoj. Mi trovis du fontojn, kiuj okupiĝas pri la historio de IPR: *Rudolf Rakuŝa: Metodiko de la Esperanto-instruado (Rotterdam, 1991. p.46-47.;* pli fruaj eldonoj: 1959, 1970), kaj *Szerdahelyi István: Metodologio de Esperanto (Budapest, 1988. p.335-6.).* La indikoj en la du verkoj diferencas.

En 1906 fondiĝis la unua organizaĵo de esperantistaj instruistoj: la *Internacia Asocio de Instruistoj* (IAI), kiu aperigis la unuajn jarkolektojn de IPR inter 1908-1914. Laŭ Szerdahelyi la lasta kajero de la unua periodo aperis en 1912. La eldono de la periodaĵo ne estis facila, ja inter 1908-1910 aperis 4 kajeroj, poste dum 2 jaroj la revuo ne estis eldonata. La dua jarkolekto aperis en 1912, entute 7 kajeroj ĝis julio (do, ĝi aperis monate). Ankoraŭ en ĉi tiu jaro startis la tria jarkolekto kun duobla kajero en aŭgusto-septembro. Poste la revuo ne estis eldonata ĝis 1922. La redaktoro estis la kasisto de la organizaĵo: la moravia instruisto, **T. Cejka**.

En la dua periodo (1922-1933; laŭ Szerdahelyi 1922-1939) de IPR la revuo estis daŭrigo de la periodaĵo *La Novaj Tempoj*, fondita de francaj instruistoj. En 1924 fondiĝis la *Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj* (TAGE), kaj en 1927 la gazeto alprenis la nomon Internacia Pedagogia Revuo. Ĝi estis redaktata en Germanio ĝis 1933, sed pro la plifortiĝo de la naciismo de la germanoj oni ne plu povis eldoni la revuon tie, pro tio oni transigis ĝin en Nederlandon en 1933. Ĝis la Dua Mondmilito entuziasma grupo redaktis la gazeton: **Ludwig el Pirna, Kurt Riedel, P. Korte, M. Goldberg**. La Dua Mondmilito metis finon al la dua periodo de IPR.

Kvankam la revuo havis la nomon Internacia Pedagogia Revuo nur ekde 1927, la periodo de La Novaj Tempoj strikte apartenas al IPR, efektive ĝi estis komence pedagogia organo de la francaj instruistoj. Pro tio oni enkalkulas ankaŭ la tempon 1922-1927 en la duan periodon.

La plej forta nacia pedagogia organizaĵo post la Dua Mondmilito estis la franca, kiu aperigis pedagogian revuon: Esperanto-Lernejo ekde 1939. En1952 la gazeto ŝanĝis sian nomon al *Espéranto et Culture*, kiu estis dulingva fakrevuo. Inter 1956 kaj 1957 la revuo havis apartan internacian aldonon: Esperanto kaj Kulturo, Internacia Pedagogia Revuo, kiu fariĝis sendependa,16-paĝa revuo en 1958 kun la titolo Internacia Pedagogia Revuo, redaktita de **A. Albault**. La revuo funkciis kiel organo de ILEI, kiu fondiĝis laŭ la iniciato de la franca kaj brita esperantistaj instruistaj asocioj jam en 1949. IPR fariĝis organo de ILEI ekde 1958. La tria periodo finiĝis en 1959, ĉar mankis la financa subteno al la eldono.

La ĉeso de IPR kaŭzis grandan mankon inter esperantistaj instruistoj, pro tio ILEI provis anstataŭigi ĝin: la organizaĵo kontraktis kun la Jugoslavia Esperanto-Instituto, por ke ĝia eldonaĵo (Kajeroj) fariĝu didaktika-pedagogia fakorgano de ILEI, ĝis la organizaĵo sukcesos subteni memstaran revuon.

Granda bezono revivigis denove la revuon en 1970: la esperantistaj instruistoj postulis modernan komunikilon. La komitato de ILEI dum la jara kunveno de julio 1969 decidis aperigi novan pedagogian fakgazeton, kiu ricevis tradicie sian malnovan nomon. Komenciĝis la kvara periodo de IPR.

En januaro 1970 aperis Provnumero en kvanto de 2000 ekzempleroj, redaktita de **Helmut Sonnabend** (vicprezidanto de ILEI), eldonita de **Ludwig Pickel**, kiu subtenis la eldonadon per la helpo de sia libroservo kaj aliaj Esperanto-aktivecoj (71/2 p.25.).

La plano estis, ke "IPR fariĝu la pedagogia forumo, sur kiu estu diskutotaj ĉiuj pedagogiaj demandoj de nia epoko"(70/0 p.4.). Por la intereso de la regula aperigo Sonnabend proponis, ke ĉiu landa filio fondu laborgrupon, kiu kolektas la originalajn kaj tradukitajn pedagogiajn verkojn kaj kiu estas respondeca por la kvalito de la artikoloj. La farantoj de la revuo fiksis, kiuj landoj devas kontribui per artikoloj al la aktualaj numeroj. Laŭ la planoj ĉiu kajero estus konstruita laŭ fiksita strukturo (tiu ĉi strukturo multe ŝanĝiĝis dum la jaroj):

a) Teoriaj artikoloj el la pedagogia scienco
b) Fakmetodaj kaj didaktikaj traktaĵoj
c) Informoj el la pedagogia vivo
d) Opinio - propono - deziro - sciigo

La esperantistaro urĝigis la starigon de la nova revuo kaj akceptis kun granda entuziasmo la aperon de IPR. Laŭ la planoj IPR aperintus en januaro, majo kaj septembro. Sed multfoje financaj kaj redaktoraj kialoj malfaciligis la eldonadon. Ludwig Pickel, kiu entreprenis eldoni la revuon komence - kaj kiu havis financan riskon -, varbis abonantojn al la sekvantaj kajeroj, sed sur la abonlisto staris nur 189 nomoj. La redaktoro ankaŭ ne ricevis artikolojn. Ludwig Pickel pro la manko de abonantoj ne riskis la eldonon de la dua numero. Ĝi aperis nur en oktobro, ĉar nur por tiam li sukcesis certigi la financajn kondiĉojn per la decido de ILEI-konferenco en Maribor 26-31 de julio 1970. Laŭ la estrara decido "la landaj sekcioj respondas pri deviga abono de ĉiu membro al IPR" kaj pri la kvanto de la kontribuaĵoj. La sekcioj havis la taskon akiri reklamojn por IPR. La estraro proponis, ke oni starigu komision ĉe ĉiuj landaj sekcioj, kiu prizorgu la elektadon, kvaliton kaj sendadon de la artikoloj (70/1 p.18.). Kvankam Helmut Sonnabend planis, ke post tio en ĉiu jaro aperos tri kajeroj, pro - supozeble - financaj cirkonstancoj en 1971 kaj 1972 aperis nur po unu numero. En 1973 ŝanĝiĝis homoj en la postenoj kaj komenciĝis denove la varbado de abonantoj, ĉar pro la neregula aperado - kaj pro tio, ke multaj abonantoj eĉ ne ricevis ekzemplerojn - la revuo perdis multe da abonantoj. La Varbnumero estis senpaga, ĝi estis financita helpe de IPR-fonduso (per monodonacoj), kaj la redaktista grupo decidis, ke oni sendu ĝin ankaŭ al la socialismaj landoj. Malgraŭ tio, el la socialismaj landoj oni ne povis aboni la sekvantajn numerojn, ĉar ili havis transpagajn problemojn. Kelkaj numeroj el la unuaj jarkolektoj do ne aperis. Mi nun listigas la aperintajn kajerojn, por ke ĉiuj sciu pri la ekzistantaj numeroj, kaj pro tio, ke preseraro ŝteliĝis en la numeradon de la unua jarkolekto.

- 1970 0 (Provnumero), 1, 2 Jarkolekto 1
  (La 2-a numero estas erare signita 1971/2) [...]
- 1971 1 Jarkolekto 2
- 1972 1 Jarkolekto 3
- 1973 Speciala numero *(artikolo de István Szerdahelyi: La lerneja instruado de la Internacia Lingvo. Enkonduko en instrumetodon)*.
- 1973/74 Varbnumero, 1, 2, 3 Jarkolekto 4
- 1975 1, 2, 3 Jarkolekto 5
- 1976 1, 2, 3, Speciala numero *(pri Internacia Pedagoga Ekzameno de ILEI)*

Ekde 1977 aperis tri kajeroj en ĉiu jaro ĝis 1987, en 1988 IPR fariĝis trimonata revuo kun po 4 kajeroj jare. En la jaroj 1987 kaj 1994 duoblaj numeroj estis

eldonitaj, ĝis 1995 do aperis - inkluzive la Varbnumero el 1973 kaj du specialaj numeroj - 80 kajeroj.

IPR do estas la organo de ILEI, kiu estas ligo de esperantistaj instruistoj. Sekve la revuo celas ne nur la instruistojn instruantaj Esperanton, sed ĉiujn instruistojn, kiuj okupiĝas pri Esperanto - precipe kiuj instruas iun studobjekton per Esperanto. Ĝis la numero 77/3 la revuo aperis kun la surskribo "Eldonata de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj ". Laŭ tio ni pensus, ke IPR estis la forumo nur de la instruistoj, instruantaj Esperanton, sed jam en la fruaj numeroj ni renkontiĝas kun artikoloj pri aliaj studobjektoj (70/0, 71/1), pri fakterminoj (75/1), pri muziko-terapio (76/3) ktp.

IPR helpas efektivigi la taskojn de ILEI: ĝi faciligas la kunlaboradon inter diverslandaj esperantistaj instruistoj por la praktiko de Esperanto (ekz.: per korespondaj rubrikoj); en la revizo oni povas pridiskuti diversajn pedagogiajn, metodologiajn kaj didaktikajn problemojn; la instruistoj povas konigi al la gekolegoj la fakajn rezultojn en siaj lernejoj; IPR raportas pri lernejo-fondaĵoj[...]; ĝi informas pri konferencoj, pri diversaj pedagogiaj aranĝoj; ĝi ebligas la korespondadon - per ĉio ĉi helpante la klopodon de ILEI por enkonduki Esperanton en - pli multajn - lernejojn.

Landoj kaj sekcioj

Albanio



Dank' al prizorgo de f-ino Marija Beloŝević, sekretario de ILEI, grupo de junaj albanaj e-istoj denove sukcesis vojaĝi al Kroatio, entute kvin 16-18-jaraj junulinoj kaj ilia instruisto, Bardhyl Mezini.
Ili pasigis ses tagojn en Zagrebo vizitante kune kun kroataj knabinoj plurajn kulturajn, historiajn kaj turismajn lokojn. Ili kune rigardis „Mazi en Gondolando". La albanaj kaj kroataj lernantoj interamikiĝis kaj praktikis la internacian lingvon. Certe estonte ili ne nur korespondos sed ree kuniĝos en Albanio aŭ en Kroatio.

*Laŭ la informoj de **Bardhyl Mezini***

Brazilo

Brazila Esperanto-Ligo de la jaro 1991 proponas bazan **perkorespondan kurson**, kies aŭtoro estas Prof. Eŭclides Geraldis de Carvalho, kiu ĝentile rajtigis BEL-on uzi ĝin. La kurso, kiu povas esti farita individue aŭ grupe, konsistas el 16 lecionoj kun ekzercoj. La gelernantoj ricevas 4 lecionojn, resendas la solvitajn ekzercojn al BEL kaj la monitoroj kontrolas la solvojn kaj

resendas ilin al la gelernantoj, kune kun pliaj 4 lecionoj. La kontrolitajn ekzercojn akompanas: folio kun komentarioj; folio kun la ĝustaj solvoj de la ekzercoj; fald-folioj priskribantaj aspektojn de la E-movado, kiel ekz.: *Kio estas E-o?; Kio estas BEL?; E-o en radio; Havu milionojn da amikoj en la tuta mondo; Mito kaj realeco* (de Claude Piron, portugallingva traduko); *Kiel mi povas uzi E-on?*; informoj *pri Koresponda Servo Mondskala*; *Listo de revuoj kaj gazetoj aboneblaj ĉe BEL*; *BEL- kaj UEA-aliĝiloj; Listo de libroj disponeblaj en BEL- Libroservo, Informaj materialoj pri la baza perkoresponda kurso; folio kun orientigo por la solvo de la ekzercoj* (laŭ akirita sperto, BEL donas kelkajn klarigojn pri punktoj ordinare malbone solvitaj de multaj lernantoj).
Ĝis la fino de la pasinta jaro, matrikuliĝis 1389 gelernantoj, nome: 13 en la jaro 1991; 572 en 1992; 146 en 1993; 394 en 1994; kaj 265 en 1995. Ricevis atestilon ĝis nun: 52 gelernantoj en la jaro 1992; 59 en 1993; 68 en 1994 kaj 79 en 1995. Multaj el ili jam fariĝis membroj de BEL kaj de UEA, abonas revu-ojn, aĉetas librojn ĉe nia Libroservo kaj partoprenas naciajn kaj universalajn kongresojn. La kursaj laboroj estas plenumataj de unu kunordiganto kaj du monitoroj .
La plej bonaj sekvoj de la kurso en nia kontinenta lando estas ke ĝi atingas homojn, kiuj ne havas la eblecon viziti klasĉambron aŭ loĝas en loko, kie ne estas esperantaj instruistoj. Lastatempe multe kreskis la nombro de brazilaj urboj kun esperantistoj.

BEL-estraro

CER – nova E-kurso en Internet

Kultura Centro de Esperanto-Campinas (KCE) lanĉis en junio '96 la perretan kurson CER - Curso de Esperanto pela Rede, por portugallingvanoj. Ĝi estas la kvina el la serio de E-kursoj, kiuj funkcias de kelkaj jaroj en Internet, nome: FEC (en la angla), CGE (en la franca), KEK (en la germana) kaj MSK (en la ĉina).
La kurso estas adapto el la franclingva CGE - Cours Gratuit d' Esperanto, kreita el la kurso de Kebekia E-Societo. Same kiel la aliaj, ĝi estas senpaga kaj enhavas 10 lecionojn kun ekzercoj. Oni aliĝas per elektronika mesaĝo al la kunordiganto de la dezirata kurso. Kiel respondon la interesito ricevos la unuan, enkondukan lecionon, kune kun la adreso de sia persona korektanto. Tiu estas volontulo, kiu okupiĝas pri la ricevado kaj korektado de ekzercoj, kaj samtempe sendado de klarigoj kaj nova leciono, samkiel ordinara perpoŝta sistemo. [...]
Karakterizo nove prezentita de CER estas la aldono de eta teksto pri esperantismo kaj historia movado al la fino de ĉiu leciono. La tekstoj verkitaj de David Bianchini celas emfazi al la lernanto, ke E-o estas lingvo kun kultura kaj movada fonoj, kiuj garantiis ĝian pluekzistadon. En la fino de la kurso la respondeca teamo liveros al la lernanto ĉiujn informojn por uzi E-on en la reto kaj daŭrigi la lernadon kaj por uzi la plej taŭgajn E-programojn.

La leganto povas imagi, kiel malfacilas instrui per tute gramatika kurso, sen bildoj, sen parolaj ekzemploj kaj eĉ sen supersignoj! Ĝi tamen atingas sian publikon, kiu malverŝajne okupiĝus pri tuja lernado de la lingvo se tiu ebleco ne ekzistus en la reto. Multaj el la nunaj korektantoj estis iam lernantoj de la kursoj. [...]
La kunordiganto de CER estas d-ro *José J. Lunazzi* (de KCE kaj Universitato de Campinas), kiu ricevas aliĝojn tra la adreso: kultura@luring.unicamp.br. Pliaj informoj en: http://www.aleph.com.br/kce.
Poŝtadreso: KCE, Caixa Postal 1097-BR-13001-970 -Campinas, SP - Brazilo

Informis: ***Atilio Orellana Rojas***

Finnlando

Fine de junio '96 en Finnlando okazis Nordlingua, kongreso por skandinaviaj lingvoinstruistoj. Nia finna sekciestro, s-ino Raita Pyhälä preparis E-ekspozicion por la kongreso. En tiu laboro ŝi ricevis helpon de Renée Triolle kaj de svisaj, norvegaj, germanaj, italaj, brazilaj, usonaj, svedaj kaj danaj ILEI-anoj. Ŝia celo estis montri, ke E-o havas propran kulturon kaj la internaciismo kaj multlingveco estas io alia ol posedo de la angla lingvo. El la 450 kongresanoj haltis ĉe la standoĉ. 60-70 personoj. Ŝi donis al ili nacilingvajn informmaterialojn kaj kune kun tri helpantoj interparolis kun la interesiĝantoj. Krome, s-ro Ahomäki prelegis angle pri Esperanto.
S-ino Pyhälä opinias, ke nia movado bezonas personojn, kiuj havas meritojn kaj aŭtoritaton ankaŭ en aliaj terenoj. Tiuj personoj helpos nin eniri en neesperantistajn terenojn, kiel ekzemple Nordlingua.

Laŭ la informoj de ***Raita Pyhälä***

Germanio

13-a Printempa Semajno Internacia + 3-a Printempa Lernejo Internacia

28 marto – 4 aprilo 1997, DUDERSTADT, Harc-Montaro



La Printempa Semajno Internacia estas granda internacia renkontiĝo por la tuta familio. Ĝia celas kontentigi samtempe plenkreskulojn, junulojn kaj infanojn. La Printempa Lernejo Internacia estas speciala aranĝo por gejunuloj inter 10 kaj 16 jaroj, kiuj almenaŭ iomete parolas la internacian lingvon. Oni aranĝos kursojn ankaŭ por komencantoj.
Kelkaj tradiciaj programeroj: diskutgrupoj, prelegoj, kursoj (pri ludoj, dancoj, kantoj ktp.), lingvokursoj por ĉiu aĝo, nacilingvaj kursetoj, artaj manlaboroj, ekskursoj, kineja horo, vespera kultura programo, vespera trinkejo.
Duderstadt estas bela mezepoka urbeto kun 23000 enloĝantoj, pli ol 500 antikvaj trabfakaj domoj meze de Germanio. La loĝado kaj programo okazos en Jugendgästehaus Duderstadt. La partoprenkotizoj varias inter 0 kaj 440 DEM.

Aliĝoj kaj pli detalaj informoj, ekzemple pri rabatoj kaj krompagoj:

Germana Esperanto-Asocio, Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweng-Str. 11, DE-53474 Bad Neuenahr - Ahrweiler. Telefono: +49-(0)2641-4885. Telefakso: +49-(0)2641-9786-66 (oficeja)

* * *

La ***eldonejo ILTIS*** serĉas kelkajn antaŭmilitajn numerojn de **Internacia Pedagogia Revuo**, krome ĝi serĉas la numerojn 90/1,2 kaj 91/1. Kiu povus liveri ilin? Adreso: *ILTIS-Eldonejo, Postfach 600130, DE-66067 Saarbrücken, Germanio Tel. kaj fakso: (0681) 81 67 13*

Hungario

Nova sekciestro

Post la demisio de la ĝisnuna sekciestro, la 19-an de oktobro '96 la asembleo de la Hungara ILEI-Sekcio elektis novan estron. Li estas József Németh, redaktoro de nia revuo. Dankon al Márta Kovács pro la ĝisnuna sekciestra laboro.

Internacia koresponda lingvokurso

Se vi havas malmulte da tempo, se vi ne povas viziti lingvokurson, se vi mem volas difini vian rapidecon en la lernado, partoprenu LA INTERNACIAN KORESPONDAN LINGVOKURSON de progresantoj. La partoprenkotizo diferencas laŭ la jara nacia enspezo. Ekzemple por nederlandanoj ĝi kostas 150 guldenojn, por hungaroj 40 guldenojn, por pakistananoj 12 guldenojn, por brazilanoj 36 guldenojn aŭ egalvalorojn. Se vi ne povas transpagi, aŭ pagi, tamen vi ŝatus perfektigi vian lingvoscion, skribu al ni kaj ni klopodos trovi solvon por vi. La kotizo estas pagenda post la ricevo de la unua taskfolio al la konto ĉe UEA aŭ al la Hungara Nacia Banko.

Pliaj informoj ĉe Hungaria Esperanto-Asocio HU-1386 Budapeŝto Pf. 193

Italio

Korespondu kun italaj lernejanoj

La infanoj de kelkaj klasoj en lernejoj apud la centr-itala urbo Aquila lernas E-on kaj volonte korespondus kun eksterlandaj lernejanoj (inter 9 kaj 11 jaroj).
Sendu viajn korespondproponojn al *Padre Quirino Salomone, Centro Celestiniano, Piazza Collemaggio, Santa Maria di Collemaggio, IT-67100 L'Aquila, Italujo.* Li pludisdonos la korespondaĵojn laŭ la aĝo kaj la deziro al la italaj lernejanoj. Eblas ankaŭ tut-klasa korespondado.

Kroatio

Pluraj e-istoj kun belaj sentoj rememoras iamajn somerlernejojn en kroata ĉemara urbo Primoŝten. Instiganta je tio, Kroata Esperantista Unuiĝo ĉi-jare okazigis la somerlernejon, sed pli norde, en Pula. Fakte estis organizita ankaŭ „kontinenta" en Zagrebo. La somerlernejon partoprenis e-istoj el Kroatio kaj Italio. Dum la semajno, krom perfektiga kurso, funkciis laborgrupoj: muzika

kaj drama. Dank' al la pozitivaj spertoj, KEU jam nun planas okazigi la somerlernejon venontjare. Ĉiuj interesuloj povas jam nun aliĝi letere ĉe la kroata ILEI-sekciestro aŭ rete ĉe la sekretario de ILEI (vd. la kovrilpaĝojn).

Marija Beloševiĉ

Kubo

Grupo de prizonuloj en Kubo ekinteresiĝis pri la IL. La ideo venis de la Ministerio de la Interno kaj la taskon tuj alprenis entuziasma teamo de Habano del Este. Nuntempe ĉ. dudek malliberulojn instruas s-ino Justa Piñera, kiu sukcese vivtenas la scivolemon de tiuj personoj. Ilia unua instruistino estis Alicia Romay, kiu pro labormotivoj devis rezigni pri tiu ĉi pionira laboro. Ŝi starigis kontakton kun la loka kulturdomo kaj de tiam ĉiumonate oni organizas tie esperantlingvajn vesperojn. *Laŭ La Noktuo 1/96*

Nederlando

La 11-an de februaro la jarkunveno de la *Nederlanda Grupo de Geinstruistoj pri Esperanto* (NGGE) malfondis la unuiĝon kaj decidis daŭrigi la agadon kiel fakgrupo de *Esperanto Nederland*. La 16-an de marto la fakgrupo unuafoje kunvenis. Ĝi elektis la nomon "Fakgrupo NGGE" kaj decidis, ke trikapa estraro gvidos la fakan sekcion. Du membroj de la antaŭa unuiĝo pretis plu funkcii, unu membro estas ankoraŭ serĉata. Sekretario/kasisto restos Hans ten Hagen. La kunveno akceptis "Interkonsento"-n kun la estraro de *Esperanto Nederland* kaj priparolis la modelon de la sekcia regularo, kiun ĝi aprobis. Ankaŭ la buĝeton por 1996 la membroj akceptis. Ampleksan diskutadon elvokis la proponita agadplano de la fakgrupo. Ĝi enhavas i.a. la kolektadon de ĉiuj donitaĵoj koncerne la instruadon de Esperanto en Nederlando. La fakgrupo dissendos enketilojn al ĉiuj personoj pri kiuj ĝi scias, ke tiuj instruas aŭ pretas instrui. Ĝi invitos ĉiujn lokajn sekciojn kaj grupojn informi ĝin pri okazantaj kaj/aŭ okazontaj kursoj. Ĝi transdonos al la Instrua Servo la nomojn de instruantoj kiuj pretas korekti hejmtaskojn de lernantoj kiuj partoprenas skriban kurson. Ĝi daŭrigas la organizadon de studotagoj kaj aliaj por-instruistaj studkunvenoj. Ĝi klopodos instigi komencintojn kaj progresintojn daŭrigi la studadon kaj celas varbi novajn instruontojn. La bulteno *NGGE Sciigas* daŭre aperados. Ĝi enhavos plejparte artikolojn pri instrumetodoj kaj studiloj.

***Hans ten Hagen** (laŭ la revuo FEN-X, 4-1996)*

Norvegio

The 2nd European Education for Peace Congress Lillehammer, 26-30.07.96

Educating for human rights

Mi partoprenis la kongreson de la organizaĵo Teachers for Peace en Lillehammer kiel reprezentanto de Norvega Esperantista Ligo. Tio estis eŭropa kongreso. Partoprenis ĉirkaŭe 400 personoj, kelkaj eĉ el Afriko.

Mi estis kolektinta grandan stokon da informoj kaj historiajn eseojn pri la evoluo de la Esperanta politiko, ekde la prezento de E-o en La Ligo de la

Nacioj en Ĝenevo en 1922, kiam la franca ministro pri instruado malpermesis la instruadon de E-o en francaj lernejoj, kaj kiam la franca delegito en Ĝenevo sukcesis prokrasti la intertraktadon pri E-o kaj fine nuligi ĝin, spite al la konsilo de la faka Internacia Konferenco por Instruado de Esperanto en Lernejoj.

En la kongreso en Lillehammer, kies kongresa lingvo kompreneble estis la angla, kunvenis nur homoj kun universitata eduko. Ili ja ĉiuj parolis la anglan lingvon, tamen ne ĉiuj flue. Sed la ideo ke la angla lingvo estus diskriminacianta aliajn lingvojn kompreneble ne ekzistis en iliaj kapoj. La ideo ke artefarita lingvo povus kontribui ion gravan al la monda kulturo estis infaneca lud-ideo; kaj tuŝi la pozicion de la angla lingvo estas kvazaŭ sakrilegio.

Krom la ĉefaj prelegoj de elstaruloj el la eŭropa aro da batalantoj por paca politiko kaj novaj procedoj por tiu politiko (procedoj estis la prelegoj kiujn aŭskultis nur la samopinianoj en la kongresejo), la kongreso ofertis al la partoprenantoj 75 programojn por laborgrupoj dividitaj inter la 400-a anaro. Mi pretigis du kaj duonhoran seminarion pri lingva diskriminacio kaj faris demonstracion de rekta instruado de E-o. Ĉeestis nur ses aŭskultantoj, sed tia estis la situacio de la plej granda nombro de la seminarioj kaj laborgrupoj, kiujn vizitis inter dek kaj tridek kongresanoj, kaj kelkaj el la grupoj nuliĝis pro manko de intereso.

Mi almenaŭ havis la etan sukceson varbi du personojn por la E-movado. Ili estas du finnoj el Helsinki. Unu diris ke li multe ŝatas tiun rektan prezentadon, kiun mi faris je nova lingvo. La alia estas lingve multescianta instruistino. Ŝi tuj kaptis la sencon kaj esencon de E-o, kaj petis min letere sendi necesajn informojn por plua studado, kion mi jam faris.

Krom la esperantigo de la du finnoj mia vizito al Lillehammer estis tute senvalora. Sed la antaŭa laboro kolekti materialon ne estis senvalora, ĉar nun mi havas materialon en mia ring-koverto kuŝanta preta por eblaj poste pli valoraj renkontoj kun pli bona reprezentado de la Esperantista Ligo. Estas ja tute stulta afero sendi unu solan personon al tia grava evento, kie li sentas sin perdita en la ejo de la leono mem. Mi do estis la sola reprezentanto, kiun la tuta eŭropa E-movado sendis al eŭropa kongreso pri homaj rajtoj. Aspekte je tiu ĉi okazaĵo tiu movado tenis sin ene en sia ludejo kiel iu Dornrozinjo ne partoprenante en la komuna vivo de la eŭropa ide-batalo. ***Odd Tangerud***

Svislando


Pri la ĝenerala asembleo de Svisa ILEI sekcio 7.9.1996 Cully/Lausanne

Ĉeestis 5 el 17 membroj. La prezidanto ricevis informojn de la sekretario de ILEI en Zagrebo pri kunsido en Ĝenevo de la *Internacia Buroo pri Edukado*, fako de UNESCO, kie ILEI rajtas kunlabori. Ĉar ILEI ne povas pagi vojaĝkostojn, ĝi deziras, ke svisoj klopodu transpreni tiun taskon. Post diskuto

oni decidis, ke la arangon partoprenos Claude Gacond, Alain Favre kaj Mireille Grosjean.
Claude Gacond kaj Mireille Grosjean, kiuj parte ĉeestis la julian seminarion ĉe KCE pri ekzamenoj en Svislando raportis pri la diskutoj kaj pri la efika kunlaboro kun KCE-anoj kaj SES-anoj.
Instruiloj de Claude Gacond. Ili taŭgas por grupo de 12 lernantoj. Portilo malmuntebla kaj A3-formataj kajeroj trovas lokon en iu normala ujo: la instruisto povas facile iri al kursejo kaj uzi ilin. Dum 1997 C. Gacond prezentos kaj la metodon kaj la ilojn dum renkontiĝoj ĉe KCE en La Chaux-de-Fonds. La kajeroj kaj la portilo aĉeteblos, kune kun klarigoj precizaj por la instruisto.
Konstato: renkontiĝo kaj diskuto pri la rolo kaj la agado de SES mankas. Ili okazos en 1997 dum seminario pri la instruiloj de C. Gacond en KCE.

JOHANN HEINRICH PESTALOZZI,

svisa pedagogo kaj verkisto, naskiĝis antaŭ 250 jaroj.



Pri lia vivo. Li naskiĝas en 1746 en Zürich, en samnoma svisa kantono ZH, kaj tie studas ĝis la fino de liceo. Li legas verkojn de Jean-Jacques Rousseau kaj de aliaj filozofoj. Li unue agadas kiel terkultivisto en Neuhof (kantono Aargau = AG). Pro komercaj malfacilaĵoj li komencas verki. En 1781 aperas la unua parto de "*Lienhard und Gertrud*".
En 1799 regas milito en Svislando pro la invado de Napoléon. Milito, bataloj, mortintoj... subite troviĝas multaj orfoj: en Stans (kantono Niedwalden = NW) Pestalozzi akceptas 80 el ili kaj flegas, nutras kaj instruas ilin sola. De 1799 ĝis 1804 li loĝas kaj instruas en Burgdorf/Berthoud (kantono Bern = BE). Poste li malfermas lernejon en Yverdon en francparola parto de Svislando (kantono Vaud - VD). (Tiu urbo troviĝas tiam sub la okupado de Bern). Tie li laboradas, aplikas siajn teoriojn kaj instruas al malriĉaj infanoj de 1804 al 1825. Paralele estas tie lertigado de instruistoj. En 1827 li mortas en Brugg (AG); lia tombejo troviĝas en Birr (AG).[...]

Pri lia agado. Oni rimarkas, ke li vivis kaj en germanparola parto de Svislando (Alemanio) kaj en francparola parto (Romandio). Li estis alemana kaj verkis en la germana lingvo. Evidente liaj verkoj tradukiĝis al multaj aliaj lingvoj. En Yverdon venis al li alemanaj infanoj, kiuj sekvis la kursojn en la franca kaj inverse romandaj infanoj povis lerni la germanan lingvon; do Pestalozzi jam organizis dulingvan lernejon. La lingvoj estis laŭ li iloj, ne instrufakoj. Hodiaŭ en Svislando oni planadas tiajn lernejojn, sed penas pro administraj malfacilaĵoj... Kun Pestalozzi la infanoj devis studi, fari dommastrumajn taskojn kaj labori en la kampoj por lerni terkulturadon. A.S. Neill en Summerhill agis iom same. Pestalozzi enkondukis ŝpinadon, Gandhi same. Pestalozzi volis, ke liaj lernantoj faru gimnastikon, novaĵo tiutempe, same kiel desegnado, manlaboro, kantado, kaj studado de geografio, historio, fremdaj lingvoj kaj matematiko. Estis konstanta fluo inter la observado de la infanoj kaj adaptado de la metodo; la Pestalozzi-metodo neniam estis priskribita de li mem, li konigis nur bazajn principojn. Oni ne forgesu, ke ĝis tiam la instruado estis ĉefe tasko de religiuloj, ke ĝi konsistis grandparte el memorigado, iom da legado kaj skribado, kaj estis tradicia, religia, ege formala. Malmulte da infanoj ricevis instruon, kaj ĉefe riĉuloj, tute elitisme. La tiutempa ideo estis, ke klerigado povus endanĝerigi la ŝtaton...
En Stans li akceptis katolikajn infanojn kaj instruis ilin pri ilia religio estante mem protestantulo. Tiu toleremo impresis multajn samtempanojn.

Pri liaj fundamentaj ideoj pedagogiaj. Pestalozzi agadis ĉefe kun orfoj, malriĉuloj, almozpetantoj, do malfavorigitaj infanoj. Jam tio estas eksterordinaraĵo! Laŭ li, oni devas eduki ne nur la kapon, sed ankaŭ la koron kaj la manojn. Do tuteca integrita pedagogio estas la bona vojo, laŭ la ritmo de la infano, sen iu premo, taksado aŭ juĝo. Gravas, ke la kuraĝo kaj ĝojo de la infano regu dum la lernado. La komenco de la instruado estas la rilatoj inter la patrino kaj la infano, tiu momento de la infanvivo plej gravas; Pestalozzi verkis "*Manlibro de la patrinoj*" kaj "*Kiel Gertrud instruas siajn infanojn*". (Vidu same la verkojn de Bruno Bettelheim). Tiu sfero estas la unua por la homo, post interna sfero, en kiu la homo rilatas al Dio. Ĉirkaŭ la patrina-familia sfero ("hejmo") estas la profesia medio, la socia tavolo, la socio entute kaj finfine la patrujo. Konkrete la instruisto devas prezenti aĵojn, tiel ke la infano povu vidi, preni, teni ilin kaj malkovri iliajn ecojn. Formoj, nombroj kaj preciza parolado, priskribo, estas la ĉefaj taskoj. Skribado venas post aŭdo kaj kompreno, post enkapa kalkulado, se temas pri ciferoj. Plie gvidado al memstarkapablo, al aŭtonomeco endas. La infano mem staras je la mezo de la pedagogio.
Persona noto. En 1995 mi aŭskultis prelegon de japana majstro pri "origami" (paperfaldado). Li menciis du skolojn, unu en Eŭropo kaj unu en Japanio. Laŭ tiu japano fama majstro de la eŭropa skolo estis J. H. Pestalozzi!
Nuntempa agado. En Trogen (Kantono Appenzell-Ausserrhoden - AR) malfermiĝis en 1946 orfejo por akcepti infanojn sen gepatroj post la dua

mondmilito. Tiu vilaĝo el 26 domoj ricevis la nomon de tiu altranga pedagogo Pestalozzi. Kelkaj domoj estas internaciaj, aliaj akceptas unu kulturon: en la tibeta domo loĝas tibetaj infanoj, tibeta paro edukas ilin en tibeta lingvo, ili manĝas tibete kaj vivas laŭ sia kulturo. En alia domo regas libana kulturo, en alia bosnia, ktp. Certe ĉiuj lernas la germanan, ĉar ĝi estas la loka lingvo. La instruistoj de tiu "vilaĝo Pestalozzi" faras konstante esplorojn kaj arigas spertojn pri interkultura edukado. En Zürich estas "Pestalozzianum", grava pedagogia esplorcentro. Multaj aliaj institucioj en Svislando kaj en la mondo portas lian nomon kaj klopodas labori laŭ liaj ideoj.

Kelkaj citaĵoj. *De samtempano*: "Pestalozzi reprenas ĉiujn demandojn ĉe ilia origino, studas la funkciadon de la naturo kaj ne la sistemojn inventitajn de homoj. Li klopodas kunigi koron, animon kaj spiriton."

De Pestalozzi: "Eksciti la atenton de la infano, ekzerci lian ĵuĝkapablon, altigi lian koron al noblaj sentimentoj, jen laŭ mi la esencaj celoj de la edukado."

"Mi mem vivis kiel almozpetanto por instrui al almozpetantoj kiel vivi kiel homoj... La nura vojo al pli evoluigita kaj demokrata socio estas edukado: Homo fariĝas homo nur tra edukado".

Konkludo. Ege modernaj estas la pensoj de Pestalozzi! Jam dum lia vivo multaj kleruloj eksciis pri li kaj vizitis lin en Yverdon. Daŭre liaj teorioj estas studataj tra la tuta mondo fare de ontaj instruistoj. En Romandio - kaj eble en aliaj landoj same - oni povus, devus repreni tiujn principojn subokulen kaj organizi la instruadon pli efike kaj en plena respekto de la tuteco de la infano. En tiu parto de Svislando, francparola, fakte li eble estas malpli konata ol en la aliaj partoj de la mondo", La svisoj konas lian emon helpi al malriĉuloj, sed lia pedagogia verko estas iom forgesata, bedaŭrinde!

Fontoj: "*Qui êtes-vous, Monsieur Pestalozzi?*" Jacqueline Cornaz-Besson, eldonejo La Thielle, Yverdon, CH, 1987 kaj "*La Suisse, de la formatin des Alpes à la quête du futur*" eldonejo Ex Libris, CH, 1975.

***Mireille Grosjean**, instruistino*
pf 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando

Katarína Bodnárová

SURVOJE AL CSEH-INSTRUISTECO

aŭ el Slovakio al Brazilo

Fininte B-seminarion, preparigante al C-seminario kaj al diplomiĝo pri Cseh-metoda instruado, komence de ĉi-jaro mi ekis grandan vojaĝon. La „konkerota" lando estis Brazilo, la celita „konkeraĵo": instru- kaj prelegspertoj.

Post pli ol duonjaro da preparoj mi atingis la sudamerikan kontinenton la 23-an de februaro 1996. La E-aktivuloj de nord-orienta Brazilo atendis min kun preta itinero kaj programdivido.

Fortaleza kaj *Federacia Universitato de Ceará* fariĝis mia unua labor-tereno. Tie mi prelegis pri E-o kaj pri lingvaj problemoj, parolis en la studenta radio-

elsendo, diskutis kun la partoprenantoj de E-kurso, kiuj promesplene disvolvadas sian agadon. Akompanante mian nelacigeblan gastiganton *d-ron Wandemberg R. Morais* al kelkaj (jes, estas pliaj) de li gvidataj E-kursoj en la periferiaj partoj de Fortaleza, okazis mia unua Cseh-leciono.

Post mallonga vizito de *Natal* jen la ebleco gvidi tutsemajnan Cseh-metodan kurson en *João Pessoa*. La lokaj E-aktivuloj bone eluzis mian „ekzotikecon" por akiri intervjuojn ĉe ĵurnaloj: *O Norte*, *A Uniao* kaj *Correio da Paraíba*. Al ĝenerala publiko mi prelegis pri Slovakio kaj interesa estis la renkontiĝo kun lokaj verduloj. Kompreneble, kio ajn estis la temo, kiun mi pritraktis, mi uzis ĉiam E-on kaj mia publiko mem turnadis la parolon al E-o, demandante pri mia vojaĝo kaj pri la lingvo, de mi uzata.

Al studentoj de *Ŝtata kaj Federacia Universitatoj de Paraiba en Campipda Rande* mi parolis pri la naturprotektado en Slovakio kaj pri la lando mem kaj enkadre de la temo „Interlingvistiko kaj planlingvoj" ankaŭ pri E-o. La ĵurnaloj *Diario da Borborema* kaj *Jornal da Paraiba* aperigis pri mia vizito artikolojn, kelkaj scivolaj studentoj venis eĉ al la renkontiĝo en la loka E-klubo. Mi konfesas, ke kun ili mi iom aligatoris, sed post kiam miaj vizitantoj spertis la glatan funkciadon de E-o inter mi kaj la klubanoj, ĉe la adiaŭo subite aŭdiĝis: „Mi lernos E-on." „Ankaŭ mi." „Ankaŭ mi." ... Post la leĝera parolado kun reprezentantoj de Verda Partio, kaj min kaj miajn akompanantojn ŝvitigis la neatendite granda kaj interesiĝema publiko en urbeto Pocinhos, kie mi prelegis.

Unu el miaj planoj por Brazilo estis la uzado de filmo *Mazi en Gondolando*. Mi scivolis pri la reago de ĝiaj spektantoj kaj provis kolekti spertojn pri la uzo de ĉi-nova instruhelpilo. La plenkreska lernantaro en João Pessoa kun atento kaj ĝuo akceptis la kelkminutajn Mazi-lecionojn, kiujn mi ĉiutage enmetis en mian instruadon. Infanajn eksperiment-subjektojn mi ricevis en *Campina Grande*. Ili, mi kaj Mazi pasigis agrablajn du horojn en la kunvenejo de la loka spiritisma grupo. Ni kantis, desegnis, ludis. La roluloj de la vidbendo evidente plaĉis al la etuloj.

La studentoj ĉe *Ŝtata Universitato de Pernambuko* kaj ĉe *Katolika Universitato* estis mia aŭskultantaro en *Recife*. Pri E-movado mi parolis en Spiritisma Federacio. La studentoj de Fakultato por Instruistoj en urbo *Nazare da Mata* lernas po-vespere. Ilin mi vizitis kun prelegoj du fojojn. Ĝeneralan publikon celis miaj prelegoj en *Caruaru* kaj en *Cabo*. En ĉi-lasta mi krome gastis ĉe s-ino Vera Rocha kaj ŝiaj 3 ĝis 7-jaraj E-lernantoj. La proksimume 15-opo de infanoj akceptis min kun neforgeseble ĉarma programeto.

En *Maceió* mi gvidis 2 nemultnombrajn kursojn. Mazi ankaŭ tie bone akceptiĝis. Same en la kristana infanhejmo, loka spiritisma grupo kaj *Bazlernejo A. Einstein*. En Ŝtata Universitato de *Alagoas* mi neformale parolis kun kelkaj profesoroj pri la ebleco enkonduki E-on en la universitatan instru-programon.

Bahia E-Asocio havas sian sidejon en *Salvador*. La tieaj aktivuloj aranĝis por mi intervjuon ĉe ĵurnalo *A Tarde*, prelegon por ĝenerala publiko kaj viziton de E-kursoj en la asocia domo mem kaj en spiritisma kunvenejo.

La E-lernantoj de *Muritiba* renkontiĝadis en la domo de mia gastiganto s-ro *Manoel Borges dos Santos*, kiun mi dum kelkaj tagoj anstataŭis en la instruado. Kun prelegoj mi vizitis la anojn de la loka Mesianisma komunumo kaj de Lions Club, la Spiritisman societon en urbo *Cachoeira*, la studentojn de Universitato de Ŝtato Bahia en *Santo Antonio de Jesus*, la Rotary Club-anojn en *Cruz das Almas* kaj la geknabojn en la loka bazlernejo.

Kelkajn tagojn mi pasigis ankaŭ en la ĉefurbo de Brazilo, en *Brasilia*. Tre interese estis viziti la apudan *Sobrinho*, en kies lernejo okazas ankaŭ E-instruado. Mi kunportis tien Mazi-n.

Bona Espero. Estis aparta sperto partopreni la vivon de ĉi-unika komunumo. La 6 semajnoj tie pasigitaj konvinkis min pri la granda laboro de gesinjoroj *Grattapaglia* kaj de ĉiuj, kiuj klopodas fari socian laboron pere de E.

Eblecon aktive partopreni la 32-an Brazilan Kongreson de E mi havis en *Riberião Preto*. Ne nur ke ĝi estis mia unua fremdlanda nacia kongreso, ankaŭ la granda nombro de ĝiaj partoprenantoj (500) elstarigis al mi tiun ĉi eventon. Mi kontribuis al la kongresa programo per prelego pri la slovakia E-movado kaj pri miaj dum-volontuladaj spertoj, pri kiuj interesiĝis la BEJO-anoj.

Mia lasta haltejo estis *São Paulo*. La tiea Esperanta Klubo Zamenhof invitis min al lecionoj por siaj lernantoj kaj la aktivuloj afable helpis min ĝis mia forflugo la 18-an de julio.

Jen la fino de mia brazilumado, de mia unua ekster-eŭropa vojaĝo. Unuaj estis ankaŭ miaj spertoj pri prelegado. Unuan fojon mi instruis Cseh-metode kaj unuan fojon spertis, kiel gustas esti vojaĝanta E-instruisto.

Mia duonjara „aventuro" kulminis en diplomiĝo pri Cseh-metodo - baldaŭ post la reveno. Tamen, la spertoj kaj travivaĵoj dume kolektitaj influos certe ne nur mian profesian vivon.

Dankon al miaj brazilaj amikoj, kies gastamo kaj kunlaboro akompanis mian tutan vojaĝon kaj apartan dankon al Eduka Fondajo „Carson" pro la subvencio, sen kiu mia vojaĝo ne efektiviĝus.

Katarína Bodnárová,
Hlavná 63, SK-07631 Streda n. Bodr., Slovakio

KONFERENCA REGULARO DE ILEI

Principoj

1. Konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI-Konferenco) estas internacia manifestacio de la instruistaro de Esperanto. Ĝi celas fortigi iliajn ligojn, evoluigi la instruadon de E-o kaj studi ties problemojn. La oficiala lingvo de ILEI-Konferenco estas E-o kaj dum ĝi estas pritraktataj temoj ligitaj al la teorio kaj praktiko de la instruado de E-o.

2. La Komitato de ILEI starigas la Konferencan Regularon, kiu servas kiel kontrakto aŭ estas la bazo kaj konsista parto de eventuala aparta subskribita kontrakto inter ILEI kaj la invitanta instanco en la konferenca lando.

3. Ĝenerale la Konferencon invitas ILEI-Sekcio aŭ loka E-organizo kaze de ne ekzisto de Sekcio. La inviton akompanu utilaj informoj pri la Konferencaj ejoj, loĝlokoj, kostoj kaj subvencioj. Al la oficiala invito estu aldonita ekzemplero de ĉi tiu Regularo, subskribita de la invitanta instanco, por atesti, ke ĝi respektos ĝiajn regulojn, se la invito estos akceptita.

4. La Estraro de ILEI informas la Komitaton pri la planoj por estontaj Konferencoj kaj konsultas ĝin pri la movad-politika dezirindeco okazigi ILEI-Konferencon en difinita mondoparto aŭ lando.

a. Surbaze de invito, kiel priskribite en la art. 3, interkonsente kun la Estraro de ILEI kaj kun la koncerna Sekcio aŭ loka E-organizo, la Estrarano pri Konferencoj esploras surloke en la invitanta lando la proponitajn kondiĉojn kaj raportas al la Estraro, kiu decidas pri la loko, tempo kaj temo de la ILEI-Konferenco kaj difinas la bazajn trajtojn de la Konferenca programo.

b. La Estraro decidas principe minimume du jarojn antaŭe pri la okazigo de ILEI-Konferenco en difinita lando.

c. La Estraro aktive sekvas la preparlaborojn de ILEI-Konferencoj.

5. En kazo de invito laŭ art. 3, ILEI - kaj la invitanta instanco subskribas apartan kontrakton kun la konsidero de la lokaj cirkonstancoj pri la organizado de la ILEI-Konferenco. Per aparta kontrakto inter ILEI kaj lokaj instancoj oni reguligas ankaŭ diversajn aliajn aspektojn de la konferenca organizado plenumotajn de aparta Konferenca Estraro el minimume tri personoj elektota en la unua kunsido: konferencejo, loĝado, ekskursoj, ktp. Tiujn kontraktojn ellaboras kaj nome de ILEI subskribas la Kasisto.

6. Konferencanoj devas fari nenion, kio kontraŭas la Konferencan Regularon aŭ malutilas al la ILEI-Konferenco kaj devas submetiĝi al la leĝoj de la lando, kie okazas ILEI-Konferenco. La Estraro de ILEI havas la rajton rifuzi la aliĝon de persono, pri kiu ekzistas motivita suspekto, ke tiu malutilus al la reputacio de la ILEI-Konferenco aŭ post interkonsiliĝo kun la lokaj organizantoj, ĉesigi la partoprenon de konferencano, kiu ne obeas ĉi tiun preskribon.

7. Ĉiu vendado de varoj en ILEI-Konferenco bezonas antaŭan aprobon de la Estraro, kiu starigas la kondiĉojn. Skriba peto pri tia agado estu liverita al la Estrarano pri Konferencoj nepre antaŭ la 30-a de junio de la konferenca jaro.

8. La Estrarano pri Konferencoj rajtas haltigi ĉiun agadon koncerne ILEI-Konferencon, kiu ne konformas al ĉi tiu Regularo. En kazo de malkonsento, la koncerna instanco/ persono rajtas apelacii al la Estraro, kiu havas la finan vorton.

Administrado

9. Principe la ĉefa administrado kaj librotenado de ILEI-Konferenco estas prizorgata de la Kasisto de ILEI. Al tiu oni sendas la aliĝojn kaj mendilojn kaj principe ankaŭ ĉiujn pagojn.
10. La lokaj organizantoj havas la taskon regule informi la Estraranon pri Konferencoj pri siaj laboroj kaj decidoj.
11. En la oficiala organo de ILEI, Internacia Pedagogia Revuo (IPR), aperas aliĝilo en la numero aperanta fine de la antaŭkonferenca jaro kaj diversaj informoj pri la Konferenco.
12. Neniu rajtas je senpaga aliĝo al ILEI-Konferenco.
13. Kalkulo de kotizoj laŭ kategorioj kaj periodoj:
a. La kotizo normale estas fiksita en nederlandaj guldenoj.
b. La bazan konferencan kotizon fiksas la Estraro de ILEI laŭ A kaj B-kategorioj laŭ UEA.
c. Rabaton je 20% ricevas la instruistoj de la Gimnazio, ĉiu junulo malpli ol 30 jara kaj handikapuloj.
ĉ. Aliĝinto, kiu ne estas membro de ILEI por la koncerna jaro devas krompagi 25% de la baza kotizo, escepte de tiuj, kiuj estas inkluzivitaj en kategorio 13c.
d. ILEI-Estraranoj rajtas aliĝi kun rabato je 25% de la baza kotizo.
e. La aliĝperiodoj estas: la unua ĝis la 31-a de marto, la dua ĝis la 30-a de junio kaj la 3-a ekde la 1-a de julio de la konferenca jaro.
f. En ĉiu nova aliĝperiodo al ĉiu kotizo aldoniĝas 20% de la samkategoria kotizo en la unua periodo.
g. 50% de la kotizo estas repagotaj se aliĝinto malanoncas sin pro valida kaŭzo antaŭ la 15-a de junio de la konferenca jaro.
14. Por faciligi la partoprenon de homoj kun ekonomiaj malfacilaĵoj la Estraro decidas pri subteno de Konferenca Kaso, kiun administras la Kasisto de ILEI.
15. En okazo de profito rezulte de ILEI-Konferenco la invitanta instanco ricevas 10%.
16. En kazo de malprofito okaze de ILEI-Konferenco, ILEI plene respondecas pri la likvido de ĉiuj ŝuldoj.
17. Ĉiuj dokumentoj rilataj al la ILEI-Konferenco estas proprajo de ILEI kaj devas esti senditaj al la adreso de la Sekretario de ILEI antaŭ la 1-a de februaro de la post-konferenca jaro.
18. Por ĉiuj demandoj ne traktitaj en ĉi tiu Regularo validas la Statuto kaj Interna Regularo de ILEI. En kazo de dubo aŭ malkonsento aŭ de eksterordinaraj cirkonstancoj ne antaŭviditaj en ĉi tiu Regularo decidas la Estraro de ILEI.

31-A ILEI-KONFERENCO

27-a julio - 2-a de aŭgusto 1997

Konferencejo Avalon

(apud Geelong, Melbourne, Victoria, Aŭstralio)

Granda salto suden

La konferencejoj de ILEI fariĝas pli kuraĝaj. En 1994 ili unuafojis en Azio, nun nur kvar jarojn poste, ili aŭdacas viziti la insulan kontinenton – Aŭstralio. Melburno naskiĝis en 1835 kaj en 1851 fariĝis la ĉefurbo de la nove fondita ŝtato Viktorio. Pro la trovo de oro ĝi dum iom da tempo estis la plej granda kaj vigla urbo de Aŭstralio. Ĝi nun havas tri milionojn da loĝantoj, nur iomete malpli ol Sidneo. La urbocentron karakterizas rektangulaj bulvardoj kaj nomiĝas „la ora mejlo". La brunakva rivero Yarra formas ĝian sudan limon, spronante ŝercojn pri ĝia fluado: subo-supre. La urbo havas multajn plaĝojn, rimarkindajn ekzemplojn de viktoria arkitekturo kaj ege multnacia loĝantaro, kiu influas pozitive la malkovreblajn kulinarajn spertojn. Tramoj malabundas tra la tuta angla-lingvio, sed Melburno liveras la escepton, kiu pruvas la regulon. Ĝi havas 750 – modernajn kaj historiajn, kies reto etendiĝas ĝis 20 km de la urbocentro, atingante vizitindajn natur-parkojn enlande de la urbo.
Viktoriaj vintroj kutimas esti mildaj (iom malpli varmaj ol adelajdaj), kun nur 50-60 mm da pluvo averaĝe. Tamen, atentu rapidajn vetero-ŝanĝojn. (*smg*)



Konferencejo Avalon

Pri la konferencejo

La konferencejo situas en bela parko, ĉe la marbordo, okcidente de Port Phillip Bay (Golfo Haveno Filipo), proksimume 100 km-ojn for de Melburno kaj 20 km-ojn for de Geelong. Ĝi apartenas al la internacie konata internulejo Geelong Grammar, kiu estos malfermata dum ILEI Konferenco. La granda urbo Geelong estis tre grava haveno por

eksporti ŝafofelojn jam delonge antaŭ la evoluo de Melburno kaj ĝi nun donas hejmon al la lanomuzeo de Aŭstralio.
La konferencejo estas ankaŭ apud la montareto You Yangs (Ju Jangs) kaj malgranda, sed interesa, vizitinda sovaĝbestvartejo enhavanta kanguruojn, koalojn ktp.
AVALON estas alia nomo por GLASTONBURY, kampara urbo en okcidenta Anglio. En 1837 iu donis la nomon al farmtereno kelkajn kilometrojn for de Corio Bay (Koraja Golfo), proksimume unu horon per aŭto okcidente de Melburno. La fondinto de la bieno Avalon estis James Austin (Ĝejmz Ostin), 1810-96. En 1832 li venis Aŭstralien kun sia frato Thomas (Tomas), poste posedanto de Barwon Park (Barŭn Parko) proksimume 40 km-ojn nordoriente de Geelong. Unue ili loĝis ĉe parencoj en Tasmania (Tazmanio), kaj poste venis al la regiono apud Geelong. La historia farmdomo konstruita en 1880, kunligas dometon farita el loka ŝtono en 1842.
James Austin gajnis sian riĉaĵon per ŝafbredado kaj diversaj komercaj entreprenoj, reirinte al Glastonbury en 1854 kun sia edzino Rebecca Savage (Rebeka Saviĝ) kaj siaj infanoj. Tiam li plenumis longdaŭran revon aĉetante la ruinojn de Glastonbury Abbey (Abatejo de Glastonberi) kaj grandan parton de ties farmtereno, ĉio privata proprietaĵo de kiam la reĝo Henry VIII transprenis la monaĥejojn dum la 16-a jarcento.
Lastatempe Avalon mem estis speciala loko de trankvileco kaj resaniĝo danke al la antaŭvido de Richard Austin (n. 1928), posteulo de James. En 1962 Richard kaj lia edzino, Jane McFarland vendis la restintan terenon, parton jam de la flughaveno Avalon. Ili donis la farmdomon al la Anglikana Frataro de Sankta Lawrence (Lorenc), fondita de Patro Gerard Tucker (Ĝerard Taka) en 1930. Li venis al Melburno en 1933, kaj la „frataro" baldaŭ fariĝis bonfara organizo. Avalon estis donacita kun peto ke ĝi estu uzata kiel „powerhouse of peace" (pacoforno). Eble ni, esperantistoj, ĉe ILEI-Konferenco povos plenumi tiun ĉi petegon! *Jennifer Bishop*

Datoj, adresoj, alvojaĝado kaj ekskursoj

La nomo de la Konferencejo: Avalon Conference Centre (480 Avalon Road, Lara, Victoria 3212, telefonnumero: +61 52 739251 kaj fakso +61 52 742152.
Ĝia poŝta adreso: 50 Biddlecombe Avenue, Corio, Victoria 3214.
Atentu: la Universala Kongreso finiĝos la 26-an de julio kaj la ILEI-Konferenco komenciĝos la 27-an de julio, do, en la sekva tago. Tiel se vi ĉeestas la UK-on, vi devos tranokti plian nokton en Adelajdo proprakoste, se vi deziras iri aviadile al Melburno. Se vi intencas vojaĝi buse aŭ trajne al Melburno, vi povas dumnokte vojaĝi. Jen informoj pri trajnoj kaj busoj:

- busoj foriras de Adelajdo je la 21.00 kaj alvenas al Melburno je la 06.55,
- trajnoj forveturas je la 17.15 kaj alvenas je la 08.00.

La ir-revena busbileto kostas AUD 86,00 kaj la trajna AUD 100,00 (la horoj kaj kostoj estas hodiaŭaj kaj ĝis julio 1997 povus esti ia ŝanĝo). Partoprenantoj por kaj UK kaj la ILEI-Konferenco el aliaj kontinentoj povas konsideri flugadon al kaj de Melburno, por kiu pli larĝa oferto kaj rabatado troveblas.

Tuttaga aŭtobusa ekskurso okazos vendrede al la marbordo. Marde oni vizitos la Universitaton Monash kaj tie oni konatiĝos de pli proksime kun la nun okazanta projekto EKPAROLI.

Aliĝilo:

31-A ILEI-KONFERENCO

27-a julio – 2-a aŭgusto

Avalon Conference Centre,

Victoria, Aŭstralio (apud Melburno)

Bonvolu sendi ĉi tiun aliĝilon al s-ro Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby, Svedio. Bonvolu plenskribi apartan aliĝilon por ĉiu persono.

Mi aliĝas al la Konferenco

Familia nomo:..... Antaŭnomo:.....

Profesio:..... Sekso:..... Naskiĝdato:.....

Kompleta poŝta adreso:.....

.....

.....Mi mendas ĉambron kvarlitan/ trilitan/ dulitan/ unulitan

Pro limigita nombro de du- kaj unulitaj ĉambroj, ni ne povas garantii lokon en tiuj por malfruaj aliĝantoj.

.....Mi deziras manĝi vegetare
.....Mi havas alian dietan aŭ loĝigan bezonon, nome:.....
.....
.....Mi volonte kontribuos al la programo per:.....
.....Mi interesiĝus pri sesio de la UEA/ILEI ekzamenoj: elementa/meza
.....Mi deziras loĝi kune kun.....
.....Mi krommendas tuttagan ekskurson laŭ la marbordo (aparte pagenda)
.....Mi alvenos al Melburno per aviadilo /buso /trajno, horo:.....
.....Mi partoprenos en la UK en Adelajdo.
.....Mi petas informojn pri kondiĉoj por familia partopreno.

Pagon de ..... mi faris al ..... en valuto.....

Subskribo:..... Dato:..... Loko:.....

KOTIZOJ

Landa disdivido kongruas kun UEA-divido. La kotizoj estas fiksitaj en aŭstraliaj dolaroj kaj nederlandaj guldenoj. Tiuj kiuj deziras pagi rekte al la kasisto en svedaj kronoj, bonvolu kontakti la kasiston.

Konferenca kotizo:

Kotizoj validaj	**ĝis 970331**		**ĝis 970630**		**ekde 970701**	
	1-a periodo		**2-a periodo**		**3-a periodo**	
Valuto	NLG / AUD		NLG / AUD		NLG / AUD	
Aliĝkategorio	A	B	A	B	A	B
Membro de ILEI	42 / 30	35 / 25	50 / 36	42 / 30	59 / 42	49 / 35
Ne ILEI-ano	53 / 38	45 / 32	64 / 46	55 / 39	76 / 54	63 / 45
Junulo, handikapulo	33 / 24	28 / 20	40 / 29	33 / 24	48 / 34	39 / 28

Kotizoj por loĝado kaj manĝado:

Kvarlita ĉambro	423 NLG	300 AUD
Trilita ĉambro	507 NLG	360 AUD
Dulita ĉambro	592 NLG	420 AUD
Unulita ĉambro	676 NLG	480 AUD

La aliĝo fariĝas valida nur post kompleta pago.
Esceptojn por partoprenontoj el landoj kun transpagaj problemoj eblas trakti kun Bertil Andreasson (*vidu la aliĝadreson*).

Bonvolu elekti la por vi plej taŭgan pagmanieron:
a) al nia UEA-konto: ilek-a, indikante ILEI-konf. (Pĝk de UEA: 37 89 64)
b) al poŝtĝirkonto n-ro 68 21 17 - 7, ILEI, Södra Rörum pl 455, S-242 94 HÖRBY, Svedio
c) per via banko al la sama adreso. Bv. aldoni 10 NLG (50 SEK) por bankkostoj
Pagante per Eŭroĉeko kaj al UEA per kredit-kartoj oni ne suferas deprenojn.

Aŭstraliaj aliĝontoj rajtas pagi sian kotizon al la kasisto de Melbourne Esperanto Assoc. Inc., S-ino Margaret Inglis, 4 Mayfield Drive, Mt. Waverley, Victoria 3149.

Vendado:
Ne forgesu la 7-an ĉapitron de nia nova Konferenca Regularo: *„Ĉiu vendado de varoj en ILEI-Konferenco bezonas antaŭan aprobon de la Estraro, kiu starigas la kondiĉojn. Skriba peto pri tia agado estu liverita al la Estrarano pri Konferencoj nepre antaŭ la 30-a de junio de la konferenca jaro."*

Kent Jones:

Enkonduko de Esperanto en usonajn lernejojn

Dum la kuranta lernojaro 805 geknaboj en 13 ŝtatoj de Usono ricevis instruadon de salajrataj instruistoj en 25 elementaj lernejoj. (Esp-istoj instruis en kelkaj lernejoj, sed mi ne nombras ilin en tiu sumo.) La instruistoj jam havas profesiajn diplomojn pri instruado, sed estas novuloj al E-o. Kompreneble ilia E-instruado bezonas plibonigon. Tio ja iom okazas: 2 el ili jam studis ĉe la universitato San Francisco State, kaj eble 3 studos ĉi-somere.

La evoluigo de E-kursoj

Por iu lernejo la komenco okazas kiam instruisto ekvidas ion pri E-o. Tio gvidas al kontakto kun ELNA, kiu elsendas informilojn. Pasintjare la afero haltis tie ĉar sen bona kono de E-o, sen materialo, sen subtenado de ELNA, neniu instruisto kuraĝus komenci E-kurson. Ekde 1993 instruistoj kiuj petas informon ricevas personajn telefonvokojn. Ĉu ili ricevis kontentigan informon? Ĉu ili ŝatus ricevi senkostajn telefonlecionojn? Se ne nun, ĉu poste?....

La pertelefonaj lecionoj kutime daŭras 30 minutojn. Kvankam ili estas seriozaj, samtempe ili estas neformalaj kaj amikemaj. **Komence** ni trarigardas la numeralojn: 0-1000, 1a-1000a. Poste onojn, oblojn, adicion, subtrahon, dividon. Ni enmiksas simplajn frazojn, ekz. *(Ĉu) du kaj tri estas (-is, -os) kvin.* Ni mencias ke infanoj lernas la numeralojn bone per ĵetkuba ludado. Necesas zorgo ne fortimigi la instruistojn, ĉar usonanoj ĝenerale neniam sukcesas paroli alian lingvon ol la anglan.

La dua leciono estas paroliga afero. La poemaro LA A-BO-CO DE E-O montras la sonojn kaj ritmon de E-o. Ni po linie tralegas ĝin, kaj la komencanto-instruisto papagas post ni. Anglalingva traduko haveblas por ke li/ŝi facile sciu la signifon de ĉiu linio. Ni mencias ke ĉiu el la 28 poemoj temas pri aferoj interesaj por infanoj.

La tria leciono daŭrigas la paroligadon. Eble nun po dulinie. Poste ni trarigardas la poemaron rilate gramatikajn finaĵojn kaj vortkonstruon. Denove tralego de la 28 poemoj.

La kvara leciono denove enhavas tralegon de la poemaro. Specialaĵo estas noti la tabelvortojn en ĝi. Tio gvidas al ĝenerala klarigo de la 9 temoj kaj 5 vidpunktoj por ĉiu temo.

Por eviti enuiĝon pri la poemaro, **la kvina leciono** enkondukas la 3-lingvan ESPRIM-LIBRETO POR TURISTOJ. Proksimume nun ili ricevas nian artikoleton pri materialoj kaj teknikoj por instrui E-on en elementaj lernejoj.

La postaj lecionoj iras laŭ la unuopaj bezonoj de la komencantoj-instruistoj. Ni konsilas ke oni ne bezonas esti Akademiano por instrui al klasoj la gramatikon. Ili ĝuu la pluan lernadon kun la klaso. Foje ili komencas instrui E-on al la lernantoj post 10 tiaj lecionoj. Aliaj hezitas dum kelkaj monatoj. Ĉiuj ricevadas E-materialojn, ĉiuj scias ke lingva helpo tuj haveblas telefone. Notindas ke ELNA elspezas 2400 USD jare por tiom da telefonado.

Specoj de la E-kursoj

Duono estas en programoj por talentuloj. Tiaj programoj permesas al la instruistoj libervole elekti interesajn temojn. Ekzistas problemo kun tiaj programoj, ĉar la lernejo povas facile ŝpari monon per nuligado de ili.

La alia duono estas diversspecaj. Unu estas en Montessori-programo. Du estas en privataj lernejoj, kie finfine ĉiu lernanto ricevos E-instruadon. Du estas parto de supervida kurso pri multaj lingvoj. En unu lernejo la lernantoj propravole venas unufoje semajne por studi E-on dum lunĉhoro. Unu lernejo estas katolika. Unu klaso konsistas el mense handikapitaj geknaboj.

Komuna faktoro estas ke la instruistoj raportas ke la lernantoj ĝuas la E-periodojn.

Signifoj de la E-klasoj

Edukaj

Nia celo NE estas krei Movadanojn. Ni bezonos 5-10 jarojn por precize taksi la helpon kiun donas E-o al la lernantoj. La lernantoj probable sentos facilecon pri la nacia lingvo kaj pri fremdaj lingvoj dum la tuta vivo. Estas nia espero ke lingvo-lerteco kontribuos al pli altaj edukaj atingaĵoj.

Politikaj

Kun la tempopaso, pli kaj pli da gvidantoj kaj civitanoj havos bonajn memorojn pri E-o. Ili insistos ke siaj infanoj lernu E-on. Neniu sukcesos mensogi al ili pri E-o.

Se la nombro de lernantoj nur magre kreskos, po 10 procente jare, duobligo okazos post ĉiu sepa jaro. Do, supozante ke estas nur 1000 en 1996, je 10% estos: 2000 en la jaro 2003, 4000 en 2010, 8000 en 2017, 16000 en 2024, 32000 en 2031, 64000 en 2038, 128000 en 2045, 256000 en 2052, 512000 en 2059, 1024000 en 2066 ktp.

Tiom da kresko estu la simpla, difinita celo de la tuta E-movado. Ĉu tiom eblas? Jes!! En Usono la kresko estis de 718 lastjare ĝis 805 lernantoj nun. Kaj la oficialigo de instruado en Brazilo ĉijare jam aldonas al ni 140 lernantojn - pli ol 10% !!

Kiel persvadi ke oni ekinstruu E-on? E-o estas plene analoga al la metra sistemo. Ili estas logikaj elpensaĵoj, sendependaj je iu ajn lando, kiuj simpligas interŝanĝojn de, respektive, pensoj kaj kvantoj. Sen la metra sistemo, 180 landoj kverelus. Ĉiu postulus la propran aron de arĥaikaj mezurunuoj, sed

devus submetiĝi al la riĉaj kaj potencaj landoj. Sen E-o en ĝenerala uzo, la samspeca ĥaoso nun ekzistas.

Instancoj simple ne povas defendi la logikon, samtempe aprobi la metran sistemon kaj malaprobi Esperanton. Ni ne agu pardonpeteme, sed fieraj kiam ni proponos E-on por lernejoj. E-o ja estas BONA LINGVO, pli bona ol iu ajn lingvo el la 3000 kavernulaj lingvoj kiuj kripligas la komunikadon hodiaŭ.

***Kent Jones**, Komisiito por Klerigo, ELNA,*
5048 N. Marina Drive, D6, Chicago II. 60640

ESPERANTO, PASPORTO AL LA TUTA MONDO

Jam dum kvin jaroj ELNA (la Usona nacia E-organizo, *Esperanto League for North America, Inc.*) planis fari E-instrukurson por televido. Lastatempe la planado firmiĝis, la teksto estis verkita, reverkita, re-reverkita, lingve kontrolita kaj polurita; kaj ĉio nun pretas (krom financado) antaŭenigi la projekton.



Esperanto, Pasporto al la Tuta Mondo taŭgos por dissendado per eduka aŭ kabla televido, celas plenkreskulojn, inkluzive studentojn ĉe gimnazioj kaj universitatoj. Ĝi konsistas el 15 duonhoraj lecionoj, uzantaj la rektan metodon de lingva instruado tiel ke la samaj video-bendoj povas esti uzataj ie ajn en la mondo.

Ni celas ke la lecionoj havu ian ...pretertempan econ... tiel ke ili povu esti uzataj senŝanĝe dum multaj jaroj. Ni celas ke la lecionoj havu daŭran historion, kiu tenos la intereson de la studantoj. Kaj, ni celas ke la lecionoj estu amuzaj.

La ĉefaj rolantoj estas la ses anoj de Familio Bonvolo: Georgo, greka filozofo, Filiso, klasika baletistino, Roberto, profesia longdistanca kuristo, Jolando, hipodroma ĵokeo, Heleno, avangardskola skulptistino, kaj Donaldo, adoleskaĝa sed genia britmoda juĝisto. La familianoj surportas nekutimajn kostumojn, kaj agas malordinare. Ili ja estas roluloj kiujn ni inventis, roluloj kun universala allogo. Tiel la kurso malfacile eksmodiĝos.

Familio Bonvolo tre interesiĝas pri internaciaj kulturaj rilatoj kaj dum la evoluo de la lecionoj spertas multajn kontaktojn - leterajn, telefonajn, hejmvizitajn, eksterlandvizitajn kaj eĉ pretersensajn - kun alilandanoj samnivele fantaziaspektaj kaj idiosinkrazie kondutaj. Post multaj amuzaj kuniĝoj kaj diskuniĝoj, la rolantoj tutĝoje rekuniĝas okaze de lastaleciona internacia kongreso.

Krom la uzo de la rekta metodo, la lecionaro estas strukturita sur kelkaj aliaj gravaj instrumetodoj, kiaj dialogaj subtitoloj, formulfrazoj, vorto-katalogoj, fotaĵoj, mapoj, desegnaĵoj, kaj komputorestigitaj lumefikoj. La video estos farita ciferece, por ke ĝi poste estu adaptebla al kodoromo kaj interagada instruado. Laborkajeroj en E-o kaj naciaj lingvoj akompanos la videobendojn.

Niaj kunlaborantoj jam produktis „reklam-videon" 15-minutan, kiu prezentas la projekton kaj celas faciligi la kolektadon de mono por nia aŭdaca projekto.

Ni invitas la kunlaboradǫn de diversnaciaj E-organizoj kaj/aŭ individuoj por la eventuala adapto de laborkajeroj por la kursaro en diversaj naciaj lingvoj. La celo estas ke ili mem povu presigi la laborkajerojn kaj senpage kopii (aŭ ni kopios je kosto) la videobendojn por loka uzado en tiuj nacioj.

Ĉi tiu projekto estas vere internacia, kaj Familio Bonvolo esperas helpi krei e-istojn mondvaste.

Pri financado: ĉiu leciono kostos 20mil USD. Ni celas kolekti almenaŭ 80mil USD antaŭ printempo 1997. Tiam ni filmos la kvar unuajn lecionojn kaj dissendos la ekzemplerojn al ĉiuj, kiuj antaŭmendis ilin. Antaŭmendoj estas aĉeteblaj je prezo de 75 USD por la 4, aŭ je 250 USD por la 15 lecionoj. Tiam ni startigos novan kampanjon kolekti aldonan monsubtenon por filmi la sekvantajn lecionojn. Nia celo estas finprodukti la tuton ene de tri jaroj.

La mono kiun ni kolektos per antaŭmendoj certe multe helpos, tamen antaŭmendoj ne sufiĉos. Tial por plenfinanci la tutan projekton ni devas peti helpon de malavaraj mecenatoj, ĉu individuaj ĉu grupaj. Kaj tion ni kuraĝe, eĉ aŭdace, faras. Ni hastas certigi ke nek ELNA nek la esperantista kunlaborantaro ricevas monan profiton. Nia laboro estas tute volontula kaj senpaga. Nia ĉefa deziro estas doni al la movado profesinivelajn videobendajn instrumaterialojn.

Ĉiun demandon por informo sendu rekte al la produktanto, Lusi C. Harmon, ĉe ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530 Usono.

Tel. [510] 653-0998. Fakso: [510] 653-1468. Reto: elna@netcom.com.

Donacojn al la projekto vi povas sendi ankaŭ al *UEA (konto nmvm-n), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015-BJ Rotterdam, Nederlando.*

Recenzoj

Travel Talk: Interaktiva disko de Libra Multimedia,

Windsor, 1996. Esperanta prilaboro de Esperanto Teachers Association. Minimumaj bezonoj: KD-ROM legilo, 148 kb/sec, 386sx, 25 MHz, VGA, Windows 3.1 kun esperantaj litertipoj, sonkarto, mikrofono, muso, 4Mb RAM.

Jen supozeble la unua kompakt-disko kun la specifa celo instrui E-on. Kiel la antaŭa disko *Detektivo en la nokto*, ĝi aldonas Esperanton al ekzistanta nemovada disko. La celo de la serio ne povas esti instrui plenan fremdan lingvon,

ĝi funkcias je la nivelo de tradicia frazlibro, kiel preparilo aŭ helpilo al vojaĝo en fremda lingvo. Ĝi proponas la lingvo-parojn angla-nederlanda kaj angla-Esperanta, do ĝi funkcias en kvar direktoj entute. La malferma ekrano proponas ĉion-klarigan enkondukon, vort-provizon, temojn (fakte frazojn) kaj dialogojn. En la vorta sekcio eblas elekti el 36 temoj kaj vidi averaĝe dudek vortojn pri ĉiu. Eblas elekti vorton, vidi ĝian tradukon kaj per kliko sur ĝi aŭdi ĝin prononcata. La lernanto povas registri sian propran elparolon kaj reaŭskulti ĝin, komparante ĝin kun la modelo. Testa funkcio elektas hazarde vorton en la cel-lingvo kaj la lernanto devas trovi la ĝustan tradukon en la konata lingvo por ricevi tondran aplaŭdon. Aŭto-hupilo avertas pri miselekto kaj la programo poentumas la progreson. Simile funkcias pri la frazoj, kiuj estas mallongaj kaj praktikaj. Frazoj (po 12-15) ekzistas por 12 temoj: ĝeneralaj esprimoj, orientiĝo, publika transporto, hoteloj, horoj kaj datoj, manĝoj kaj trinkaĵoj, butikumado, distraĵoj, poŝto kaj telefono, mono, konversacio kaj krizoj. Por tiuj samaj 12 temoj estas po du dialogetoj, ĉiu kun 4 ĝis 6 eroj. Tie eblas aŭdigi la tutan dialogon, aŭ iun ajn el la eroj, kiom ofte kiom dezirata. Eblas nur aŭskulti sen alia helpo, aŭ kun aldono de sub-titoloj en la cel-lingvo, aŭ traduko. La mem-registra ebleco funkcias ankaŭ por la dialogoj. Ĉiu stud-panelo havas agrablan koloran bildon, eblas navigi libere inter la funkcioj pere de grandaj klaraj piktogramaj butonoj.

La parolantoj de E-o estis zorge elektitaj kaj prezentas bonan modelon, i.a. Sally Phillips, Stephen Thomson kaj Roselyne Edwards. Konsilis Timothy Carr, Malcolm Jones kaj Gert Bervelling. Tradukis Paŭlo Gubbins, kies aperinta lernolibro *Kunvojaĝu*, bone preparis lin trovi adekvatajn solvojn por tre specifaj kaj ĉiutagaj fraz-formuloj. Idiomoj malmultas, do nur malofte oni devis klarigi pli ol traduki, ekz. *To buy tickets on the door*. Aĉeti biletojn tuj antaŭ la prezentaĵo. (Paranteze, mi dirus *at the door*, sed mi estas nur freneza nov-zelandano). Jukigis min nur *ĉi-buso* kaj *Liverpolo* (kvankam *Liverpulo* apenaŭ pli plaĉe aspektas) kaj la verŝajne brita prefero al *bonvole povas...* La anglaj frazoj elstarigas Oxford St, Marble Arch ktp, la nederlandaj Coolsingel kaj AHOY, E-o devas kontentiĝi je Zamenhof strato! Lernantoj de la angla devas pagi 26 pundojn por veturi al Bath, esperantistoj por la sama sumo atingas Budapeŝton!

Entute laŭdinda kaj pionira projekto konigi E-on pere de moderna kaj populara komunikilo.

Stefan MacGill

Memorlibro omaĝe al Andreo Cseh

Redaktis Katalin Smidéliusz. Sabatejo, Szombathely. 128 p. 1995.

Serĉante materialon okaze de la centjara naskiĝdatreveno de la fama pedagoga pastro Andreo Cseh, Katalin Smidéliusz trovis ĉe la Internacia Esperanto-Instituto kie ŝi laboris, zorge enpakitan skatolon. Ĝi enhavis liajn plej karajn

personajn memorigilojn! Per ili (familiaj fotoj; poŝtkartoj al liaj gepatroj; poemoj, subskriboj, kaj fotoj de liaj kursanoj; kaj paĝoj el la unuaj versioj de lia fama rekta metodo) ŝi malkaŝas en ĉi tiu libreto ĝis nun ne konatajn erojn de lia privata vivo. Krome troviĝas artikoloj kaj bildoj de malnovaj E-periodaĵoj, inkluzive La Praktiko, kiun li redaktis dum 30 jaroj. Kaj ĉion ĉi la aŭtorino ligas per interesaj personaj komentoj.

La libreto dividiĝas en kvar periodojn: „*Transilvanio*", kie Cseh naskiĝis kaj pastriĝis; „*Ĉie en Eŭropo*", kie li instruadis kaj entuziasmigis grandajn grupojn; „*Nederlando*", kie li loĝis 30 jarojn kaj fondis la Cseh-Instituton; kaj „*Plua Vivo en Nia Memoro*", al kiu kontribuis kelkaj el liaj 600 diplomitaj Cseh-instruistoj. Aparte interesa al E-instruantoj estas la sekcio „*Kiel funkcias nun la fama metodo?*", kun raportoj de sep bone konataj E-istoj. Utilas ĉe la fino indekso pri personaj kaj geografiaj nomoj .

Kiel klarigas la aŭtorino, ĉi tiu libro ne celas anstataŭi detalan biografion, kiun verkos Ed Borsboom, laŭ komisio de pastro Cseh mem. Tamen, ĝi donas fascinan aliron al lia persona vivo. Ĉar d-rino Smidéliusz havas la saman denaskan lingvon kiel Cseh (la hungaran), ŝi mem tradukis liajn personajn korespondaĵojn. Inter interesaj okazaĵoj oni povas legi pro kio decidis Cseh (kiu neniam antaŭe instruis,) gvidi sian unuan E-klason; kiu nomis lin „la gaja stelo"; kial oni forprenis lian rajton de pastra servo; kaj pri lia doloriga konflikto inter devo al siaj gepatroj kaj al la E-movado.

Eĉ se la leganto ne detale scias kia estas la rekta instrumetodo de Cseh, oni povas kapti ĝian esencon per tiaj citaĵoj kiaj „Mi ne faros kurson sed konversacion"; „Lingvon oni ensorbas kiel patrinan lakton"; „Ni ĉiam respondis ĥore, tiel li sukcesis ekparoligi eĉ la plej retiriĝemajn membrojn;" kaj „Eleganta, ĉarma parolo akompanis liajn movojn dum inter la lertaj fingroj elformiĝis etaj tablo kaj seĝo el papero. El la tuta ridetanta homo elradiis bona humoro tiel, ke la grupo ne deziris forlasi la ejon post la fino."

Sed se oni ne komprenas tiajn aludojn kiaj „la trifoja neado" aŭ „forta, kuraĝa kaj eleganta", aŭ „la fama ŝlosilo" aŭ „la matematiko AL= -N", jen instigo legi aliloke pri la detaloj de tiu ĉi instrumetodo.
De ĉia vidpunkto ĉi tiu libro estas altkvalita: teme, lingve, historie, homame, eĉ aspekte; do, vere posedinda kaj leginda ĝi estas! ***Doroteo Holland,*** *Usono*

La Esplor-kreiva vojo: apliko de humanisma lingvo-instrua modelo.

Versio en Esperanto de Oene Hoekstra.

La originan 197-paĝan anglalingvan verkon ni recenzis en IPR 1991/4. Ĝia resumo nun aperis en E-o sur 24 grandformataj paĝoj. Diagramo komence de la verko ligas dek elementojn de la aliro, kaj tiuj estas mallonge klarigitaj. Ili estas esploremo, kreiveco, motivo por komuniki, afekcio (enplekto de

emocioj), efikeco (plena eluzo de limigitaj lingvaj rimedoj), mem-aŭskultado, nivel-konforma informado kaj sendependiĝo, risko-prenado kaj memfido.
Ni citu kelkajn frazojn el la rubriko *Sendependiĝo*: „La docento reagu al iniciatoj de la lernantoj, kaj submetu sian instruadon al ilia lernado. Li ne senkondiĉe tenu sian instruplanon, sed reagu je spontaneaj iniciatoj. Se lernantoj ne kutimas iniciati, li stimulu ilin al la unua paŝo, ne klarigante sian intencon. Tiel longe, kiel la docento restas en la fono kaj ne tro baldaŭ prezentas la korektan modelon aŭ solvon de problemo, li kreas situacion de dubo. Tiel li provokas la lernantojn daŭrigi la serĉadon al la ĝustaj elementoj de la celolingvo. Mallonge, la docento kondutu sinretene. Tio ne signifas ke li lasu sin fortreni de ĉiu penso kiun ekhavas lernanto. La decido pri la irota lernvojo estas tro grava por igi la lernantojn respondeci pri ĝi. La docento estu la gvidanto sur la vojo al sendependeco."
Kelkaj alineoj skizas la deziratan personecon de la docento kaj donas gvidliniojn kaj dudek atentindajn tezojn. Fine aperas pritaksaj demandiloj, iom da bildoj kaj la uzataj vorto-kartoj por kelkaj lingvoj. La celo aŭ uzmaniero de tiuj ne estas eksplicite donitaj — la leganto devas jam mem praktiki la esploran vojon! La verko donas valoran kaj koncizan enrigardon en ĉi tiun modelon, kvankam iu deziranta ekapliki ĝin devus akiri pli ampleksan verkon aŭ, preferinde, rektan personan sperton.
La verkon vendas la verkinto*: s-ro Oene Hoekstra, Frederikslaan 47, NL-1871 SB Schoorl, Nederlando. 8 NLG inkluzive de la sendokostoj.*

Stefan MacGill

Legaĵoj kaj instruhelpilo el Danio

Valora kaj belega infanliteraturo, fabeloj de H.C. Andersen en du volumetoj. Unu el la libroj enhavas la kortuŝan fabelon pri ***La marvirineto*** kaj en la alia, titolita ***La novaj vestoj de la imperiestro*** legeblas pri *Hans-fuŝulo* kaj la fabelo *Estas tute certe.* Ambaŭ libroj estas belege ilustritaj, koloraj, allogaj kaj por infanoj kaj por plenkreskuloj. La malnovaj eldonaĵoj de KOKO mendeblas ankoraŭ en limigita kvanto ĉe la dana libroservo:
Wolfgang Kirschtein, Hvedebjergvej 30, DK-8220 Brabrand, Danio.

Kvinpinta ludaro de Eckhard Bick estas tre utila, science prilaborita kolekto de dievrsaj amuziloj. Ili tuŝas la socian kaj emocian interagon, rilatas cerban, intelektan komunikadon aŭ servas la korpon, movigas kaj senstreĉigas. En la Ludenhavo la leganto ekscscias ne nur la ludtipojn, sed ankaŭ la bezonatajn ilojn, la kvanton de la partoprenontojn kaj aliajn utilajn informojn por bone kaj konscie organizi la ludojn. Fine de la libro ankaŭ teoria parto helpas la sciencan profundiĝon. Kurs- kaj grupgvidantoj, instruistoj kaj amikaj rondoj, organizantoj de E-renkontiĝoj bone povas utiligi la lud-manlibron.
La ludaro mendeblas ĉe la verkisto:
Eckhard Bick, Rugbjergvej 98, 8260 Viby-J, Danio; E-poŝto: lineb@um.avv.dk

IpI informas interlingvistojn kaj esperantologojn

En E-o kaj diversaj naciaj lingvoj aperas pli kaj pli multe da ofte malfacile trovebla scienca materialo pri interlingvistikaj kaj esperantologiaj temoj, gravaj por sciencaj studoj kaj esploroj.

Seriozaj interlingvistoj kaj esperantologoj klopodas sekvi la fakan literaturon. Tion grave faciligas **Informilo por Interlingvistoj** (IpI), kiun eldonas Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED). La aktuala (tria) serio lanĉiĝis en 1992. Aperis ĝis meze de 1996 entute 17 numeroj kun sume 156 paĝoj, plenaj de utilaj informoj, plejparte bibliografiaj.

IpI estas abonebla ĉe *UEA (Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando)*. Jarabono por tri 16-paĝaj A5-formataj kajeroj kostas 10 guldenojn (por EU-landoj 10,60 NLG). Estas ankoraŭ riceveblaj ankaŭ la jarkolektoj 1992-1995 (po 10 gld.). Seriozaj interesitoj el landoj kun transpagaj problemoj povas laŭpete ricevi IpI senpage.

La redaktoro, d-ro Detlev *Blanke (Otto-Nagel Str. 110, DE-12683 Berlin, Germanio)*, volonte akceptas materialojn pri ĉiuspecaj interlingvistikaj aktivecoj, projektoj kaj publikaĵoj.

LA DOMO - la revuo de la profesioj kaj de la servoj

E-instruistoj rajtas peti ĝian senpagan provekzempleron. Poste vi povas montri ĝin al viaj gelernantoj por ke ili ankaŭ profesiu esperantlingve. Adreso: *TAKE - LA DOMO, RN 83 - Rue de Tiefenbach, FR-68920 Wintzenheim*

Eŭropa Poezio en Esperanto

Eldonaĵo *Eŭropa Poezio en Esperanto* pasigas jam sian duan jaron. Ĝi ricevis subtenon de **FAME-fondaĵo**, tial la abonantoj ĉi-jare pagas tri kaj ricevas kvar kajerojn, jarkolekton. Jarabono al Budapest 260, al provincoj 310 HUF, al najbaraj landoj de Hungario 5, al nenajbaraj landoj 7 IRK - inkluzive la poŝtkostojn. Jarkolekto de 1995 kostas 320 HUF, aŭ 5 IRK. En la lasta numero estas belorusa, norvega, slovena kaj hungara paĝoj kun multaj poemoj konvenaj por deklamkonkursoj. Mendu, aŭ petu provekzempleron per 1 IRK (aŭ 80 forintoj en pm.) ĉe ***D-ro Miklós Fehér**, HU-1046 Budapest, Ugró Gyula u. 17., Hungario* *(X)*

Reagoj al...

30-a ILEI-Konferenco – en IPR 3/96

Dum la ILEI-Konferenco post „C"-Seminario, kiun partoprenis 11 personoj el 10 landoj okazis diplomiga ekzameno por Cseh-metoda instruado. Sukcesis jenaj personoj: *Jennifer Bishop (Aŭstralio), Katarina Bodanarová (Slovakio), Lenĉe Efremova (Makedonio), Ampomah Badu Frempong (Ganao), Henriel Fidilao (Madagaskaro), Terezja Kapista (Jugoslavio), Kokou Sagabadjelou (Togolando), Paulina Danute Vidrinskiene (Litovio), Arnold Viktor (Usono) kaj Hans ten Hagen (Nederlando).*

Al la diplomitaj Cseh-instruistoj - nome de IEI Instrua Fako - mi deziras sukcesplenan uzon de la Cseh-metodo. Samtempe mi informas organizantojn de diversaj internaciaj E-aranĝoj, ke sur la listo de diplomitaj Cseh-instruistoj estas 35 personoj el 22 landoj kaj 5 kontinentoj. La listo kun la adresoj estas ricevebla ĉe IEI, do bonvolu profiti ĝin. ***Mila van der Horst-Kolinska***

Macioszek, MacGill, Nilsson – en IPR 3/96

[...] Interese, vere interese, legi tiel diversajn reagojn (al Georgo Macioszek, IPR 96/2· 11). Plaĉas la pledo por tolero. Estas evidente ke kritiko estu pozitiva. Ĉiu ja parolas laŭ sia kapablo, laŭ sia klero aŭ malklero. Oni ne volas kritiki la erarojn de komencantoj, sed korekti ilin. Oni ne emu malestimi eternajn komencantojn; sendube ili havas siajn kialojn kaj kaŭzojn. Sed kontraŭ eternkomencanteco mi inklinas plendi, denunci ĝin kiel misan mensostaton, kiel indiferentecon.

La 3-an reaginton mi atentigus pri tio, ke sekvanto estas persono; ke genro estas gramatika termino kiu ne taŭgas por "homoj de ambaŭ seksoj"; ke artikolo estas superflua en *dum la jaroj*; sed precipe mi deziras trankviligi lin: li rajtas diri ne nur *remi sur lago* aŭ *kanalo*, sed ankaŭ *remi en boato*; krome, li ja ĉiam povas anstataŭigi la prepozicion per eksprepozitiva finaĵo, do jen: remi boaton. (Ne)transitiveco estas afero de semantiko, kaj iafoje de stilo, pli ol de gramatiko. Komparu: *li batas sian edzinon, siajn infanojn; lia koro forte batas;* la verbo estas jen tr. jen ntr.

Al Stefan mi dirus: Jes, kompreneble oni iagrade allasu tiajn artikolojn. Ĉi-kaze, la enkonduka kaj praviga antaŭparolo facile akceptigas la (esceptan) decidon de la Redakcio. Oni ne ĉiam konsentu pri la enhavo. Ankaŭ artikoleto pri merita esperantisto (IPR 96/3· 5) estas bonvena, eĉ por kiu ne volas alpreni ŝulcajn preferojn. Ĝi neniun devigas imiti plumpan "estas gardanta" por diri nenion pli ol "gardas".

Permesu tamen alarmi pri eraro, kiu ne estas rara. Mi renkontis ĝin ĉe pluraj bonaj verkistoj. Mi trovis ĝin ankaŭ en Monato, el la plumo de i.a. Simono Pejno (kvankam li posedas Ĉapelilon). La regulo pri "la akuzativo post kiel" ne validas universale. KIEL estas plurfunkcia vorto. Iom da distingokapablo estas do necesa. *Oni elektis lin prezidanto / kiel prezidanton. Mi konsideras lin amiko / kiel amikon. Li uzis tondilon kiel ponardon.*

Ĉu predikativo, ĉu adjekto, la kielaĵo koncernas la verbon: ekzistas firma rilato inter la verbo kaj la fraz-elemento komencita per KIEL.

Nun mi stumblis pro la aludita eraro ankaŭ en la bonega kaj ege interesa kontribuo de Bertil Nilsson (IPR 96/3· 33): Tiu komitato "enhavis sendube talentajn homojn kaj eĉ korifeojn kiel ekzemple la inteligentan, energian kaj respektatan de Beaufront". Tio ne povas esti preseraro, ĉar tiel malice insista la

preskoboldo ne estas. Ĉi tie ni certe havas antaŭ ni "ekzemplodonan KIEL", ĉiam sen akuzativo! B.N. volas doni ekzemplon de korifeo: la inteligenta, energia kaj respektata dB. Ĉi tie ja temas ne pri predikativo, frazparto kiu dependas de la verbo, sed pri simpla ekzemplo, nura ilustro. [...]
Neniu gramatiko povas antaŭvidi ĉion. La lingvo tamen devas priskribi realajn situaciojn. Ĉu do povus ekzisti reguloj sen escepto? E-o havas nominativon kaj akuzativon. La predikativo (ĉu subjekta, ĉu objekta) troviĝas en nominativo (krom post kiel, kiu postulas diferencigon). Imagu nigraharan virinon. Sen via scio ŝi farbas la harojn. Nun ili estas blondaj. Do: *Mi konas virinon nigraharan. - Ŝi farbis la (nigrajn) harojn blondaj. - Mi preferis ŝin nigra. - Blonda mi ne rekonis ŝin.* En tiu lasta frazo blonda ne rilatas al *mi* sed al *ŝin*, tamen ĝi ne prenas finaĵon. [...] ***Christian Declerck**, Antverpeno*


Viglas la movado en Katalunio – en IPR 3/96

Mi ĝuis legante la 3/96. Nenio estis neatentinda. Ekde la sekretariaj informoj (M.B.); artikoloj pri Freinet kaj Šulco; kaj aliaj pedagogiaj informoj ĝis ... El landoj kaj sekcioj... kaj la bonegaj reagoj trafegaj... subskribindaj! Gratulojn kaj dankon. Tamen... pri la viglanta movado en Katalunio... mi devus klarigi ion kaj ankaŭ pliampleksigi. Vere kiu unue planis la vojaĝon de la geinstruistoj el Brazilo estis la Kataluna Esperanto Asocio (KEA). Ne tro gravas la miskomprenoj okazitaj, sed krome ili estis en urbo Mataró (kie mi povis dum tagmanĝo bone paroli kun la geparoj Aristóphio Alves Filho kaj Núbia Alves ankaŭ pri IPR!). Sed precipe rimarkinda estis ilia instruado en urbo Sabadell. La kurson en Centro de Esperanto Sabadell sekvis 10 infanoj. Kaj la afero, ligita kun akceptado de infanoj el Bosnio, disvastigita, implikis najbarajn vilaĝojn kaj la novaĵoj estis publikigitaj en multaj ĵurnaloj kaj aperis en Kataluna Televido. Fine KEA preparis la daŭrigon de la vojaĝo al Eŭskio por la geinstruistoj.
Ekde la 15-a ĝis la 25-a de aŭgusto okazis en Prades (Francio) la kutima (ekde 1968) Kataluna Somera Universitato - kun ĉi-jara novaĵo inkludi en la vasta programo „Enkonduko al E-o" gvidata de Doktorino pri kibernetiko Neus Moly kaj edza helpo de Ramón Perera[...] Entute 14 junaj kaj mezaĝaj gelernantoj sekvis la kurson inter kiuj ne mankis du profesoroj el la sama universitato. La novaĵo aperis ankaŭ en Kataluna Televido kaj kelkaj personoj estis intervjuataj en radio elsendoj. ***Lluís Armadans i Marfá***
pl. Sagrada Familia, 4, 4t, 3.a, ES-08013 Barcelona, Katalunio, T. 93-4579644

Korektoj al la kontrakto inter ILEI kaj Eventoj (aperis en IPR 3/93)

En la kontrakto pri kunlaboro inter ILEI kaj la redakcio de Eventoj:
1. La adreso de ILEI transiru al tiu de la aktuala prezidanto (*vd. dua kovrilpago*)
2. En artikolo 1.1 la dua linio tekstu: „rezultas en la malaktiviĝo de la kursaro..." *ILEI/Eventoj*

Via kalesĉo vin atendas!



KALEŜO: nova, originala, 40paĝa ,A5-formata kajero por infanoj, gepatroj, instruistoj, kaj aliaj junaj koroj - amuzaj poemetoj, aktivigaj gestoversajoj kaj kantoj, kun bildoj por kolorigi.

Prezo por unu ekzemplero: 7DM + 3DM sendokostoj = 10DM (aŭ ekvivalento).

Prezo ekde 3 ekzempleroj: po 5DM + entute 5DM sendokostoj (ekzemple por 5 ekzempleroj vi pagus 5-oble 5 plus 5 = 30DM (aŭ ekvivalenton).

Pagoj en koverto aŭ al UEA konto MSAD-W.

Nia adreso: Kalesĉo,
Esperanto Domo, p.k. 87,
H-1675 Budapeŝto, Hungario

NI KONDOLENCAS



Sur tigoj diverĝaj
disaj, tamen kunaj petaloj
dehiskaj, defalaj – nur momento da morto
kaj poste
poreterne

Petaloj de la sama
trunko, rozo
petaloj diversaj
kiel orelo kaj okulo
ili ambaŭ de la sama
komuna, kohera ĝuo tamen
Vivo – mondo – eterno –
ĉu tamen nur la morto
poreternas?

Mirko!* Mi skuas vin!
la okuloj rompitaj
la oreloj surdaj
miaj krioj refrapiĝas
de la muto gigantiĝa
Via korpo
delasita de la kruco
senvesta, nuda
eĉ ne vestita jam
de la sufero
tiom homiga
Vi estas nur palpebla
forpaso
palpebla sed jam
ne ekzista


Nuboj kaj duboj
dise tra la ĉielo

Vakuas eĉ la ploro
Vi mem vakuas
el la ploro

ja eĉ la ploro
sencelas
Vi fermas vin for de ni
en ĉerkon, en teron
en kalvan kumulon
Tamen Via vido restis
en niaj okuloj
tiele jene
propraokule vi vidos:
la verdo, la floroj
ekabundas dense
sur Via tombo
por dehiski
defali kaj
ree flori
en eterna cirkulo
Vidu, bolas jam la
akvo super la fajro –
ni enmetos la lastan
manĝon
– la lastan kun Vi –
– la unuan sen Vi –
kaj ni manĝos

Super nia tablo
vastas
la eterno

Verkis: Imre Szabó
(Hungario)



* **Mirko Emerico Marcetta**, mondcivitano, 1921-1996. Inter tiuj datoj li estis vivante revoluciulo, pacifisto, poeto, filo de Naturpatrino, kreinto de la Nova Pedagogio, Nova Geografio, Nova Kalendaro, Nova Moralo, Nova Skribo, Verdaj Punktoj kaj VIDLING. Li vivis kaj kreis en tri landoj: Italio, Kroatio kaj Hungario.
La titolo de la poemo estas la simbolo de la ideografia lingvo VIDLING destinata al ĉiuj popoloj kaj legata de ĉiu en sia gepatra lingvo. Ĝi metiĝas je la servo de ĉiuj lingvoj kaj kulturoj kiel ilo por fratigi popolojn.

La redakcio de IPR el la nomo de ĉiu ILEI-ano esprimas sian kondolencon ankaŭ okaze de la forpaso de la redaktorino de "Heroldo".
Ada Fighiera-Sikorska, ŝia nelaciĝema karaktero kaj sindona laboro por la movado estos ĉiam sekvenda ekzemplo por ŝiaj kolegoj, por ĉiu samideano. Ripozu en Paco.

Leterkesto

„Nin ĝojigas la fakto ke vi regule adresas al ni vian informilon. Por ni ĝi estas tre utila ĉar tio helpas nin akiri nemalhaveblajn sciigojn kiujn ne ĉiam oni publikigas kaj aliflanke, ĉar aliel ne eblus ke ni posedu ilin..."

Juan Ramón Rodriguez Gomez,
Internaciaj kaj Publikaj Rilatoj, Kuba Esperanto Asocio

Gazetara komuniko:

(Mal)nova redaktoro por Juna Amiko!

Ekde 1997, la revuo *Juna Amiko*, eldonata de ILEI, havos novan redaktoron. Samtempe malnovan, ĉar reprenos la taskon ĝia kun-fondinto kaj unua redaktoro (de 1972 ĝis 1982):

s-ro Géza Kurucz, Nyíri u. 11. HU-6000 Kecskemét.

La ĝisnuna redaktoro kaj aliaj helpantoj restos en la redakcia teamo. Bv. Sendi ekde nun ĉiujn redakciajn aferojn (sed nur tiujn!) al s-ro Kurucz (kontribuaĵojn, konkurso-solvojn, korespond-petojn ktp.). Nigra-blankaj desegnaĵoj aŭ fotoj akompane al artikoloj estas aparte bonvenaj. La gazeto reiros al rubrika stilo, sed de tempo al tempo prezentos sekciojn laŭ la nuna kutimo.

Ĉion administran (petojn por specimenaj ekzempleroj, adres-ŝanĝojn, plendojn pri ne-ricevo, abonojn ktp.) bv. Plue sendi al la konata adreso: *Juna Amiko, pf. 193, HU-1368 Budapest.* Ĉiuj perantoj bv. Sendi siajn listojn kaj leterojn tien. Duobla numero 96/3-4 estas en finpreparo por fermi ĝustatempe ĉi tiun jarkolekton.

La nuna redaktoro kore dankas la kontribuintojn, desegnistojn, legantojn, perantojn kaj ĉiajn helpantojn, kiuj permesis al la revuo bone adaptiĝi kaj sukcese travivi la lastajn dek perturbajn jarojn.

FINANCA RAPORTO DE ILEI POR LA JARO 1995

RIMEDOJ	SEK	KOSTOJ	SEK
membrokotizoj	51.876:34	IPR	69.030:17
libroj	1.953:43	Konferenco	4.890:95
eldonoj (profito+stoko)	21.167:90	afranko	5.896:04
kompenso UEA '94	12.415:50	estraraj kostoj	13.094:67
kompenso UEA '95	12.415:50	fotokop., materialoj..	3.532:19
ekzamenoj	1.073:17	faka kotizo UEA	1.204:30
interezo	5.250:50	bankkostoj	839:40
Koleghelpa konto*	1.172:54	gazetoj	1.110:34
Fondaĵo Szerdahelyi*	2.243:10	Koleghelpa konto*	1.440:00
diversaĵoj	7.045:22	oficejaj iloj	2.152:02
		honorarioj	590:49
		UK	662:16
		Azia agado	860:00
		profito	6.990:47
Sume:	**116.613:20**	**Sume:**	**116.613:20**

* Ĉiuj sumoj estas netaj escepte Fondaĵo Szerdahelyi kaj Koleghelpa konto. Bonvolu vidi la detalan raporton.

AKTIVO	SEK	PASIVO	SEK
en kaso	0	Koleghelpa konto	67:85
banko SE	57.773:14	kreditoroj:	
Färs&Frosta	3.077:14	Fondaĵo Szerdahelyi	11.306:02
Postĝiro	5.293:16	GCA	20.059:34
UEA, ilek-a	56.249:95	privatulo	5.794:40
ĉe sekcioj	1.703:79		
librostoko	14.500:00		
nepagitaj fakturoj	4.713:75		
oficejaj ajoj	4.500:00	propra kapitalo	110.585:12
sume:	**147.812:73**	**sume:**	**147.812:12**

Koleghelpa konto		**Fondaĵo Szerdahelyi**	
Saldo 94.12.31	335:31	Saldo 94.12.31.	10.036:65
Donacoj	1.172:54	Repago de prunto	413:85
18 membrokotizoj	-1.440:00	Aŭkcio (Övik)	587:70
Saldo 95.12.31.	**67:85**	Donaco	1.241:55
		Interezo	117:60
		Saldo 95.12.31.	**12.397:35**

Fonduso Erika Linz		Stipendioj	- 5.828:00
Saldo 94.12.31.	136.340:60	Interezo	6.658:10
Administrado	- 250:00	Plivaloriĝo de oblig.	2.876:00
		Saldo 95.12.31.	**139.796:70**

JUNA AMIKO

RIMEDOJ	SEK	KOSTOJ	SEK
Abonoj	30.637:35	Afranko	8.272:82
Vendo	451:95	Honorarioj	739:32
Interezo	29:89	Presado	6.575:38
		Ekspedo	790:60
		Gajno	14.741:07
Sume	**31.119:19**	Sume	**31.119:19**
AKTIVO	**SEK**	**PASIVO**	**SEK**
En banko	489:55	ILEI	7.158:51
UEA: juna-1	30.637:35	Kreditoroj	2.520:00
Nepagitaj fakturoj	380:00	Propra kapitalo	21.828:39
	31.506:90		**31.506:90**

Rimarkoj:

IPR: Dum 1995 ni pagis por 6 numeroj. En 1994 ni pagis nur por 2 numeroj. La normala ritmo estas 4 numeroj jare. Se oni dividas la kostojn per 2, oni ricevas la sumon 44.310:25 SEK, kiu bone korespondas kun la membrokotizaj enspezoj.

Konferenco: La sveda krono estis tre malforta ĝuste tiam kiam ni devis pagi la konferencajn kostojn kompare al la tempo kiam ni fiksis la kotizojn, tial ni iom malgajnis.

Eldonado: Por la unua fojo la eldonado montras plusan rezulton.

FINANCA PLANO DE ILEI POR LA JARO 1997

RIMEDOJ	SEK	KOSTOJ	SEK
Membrokotizoj	56.200	IPR	50.000
Libroj	1.000	Konferenco	5.000
Koleghelpa kaso	500	Afranko, telefono	8.000
Fondaĵo Szerdahelyi	500	Estraraj kostoj	14.000
Kompensoj UEA	12.000	Fotokop., materialoj	3.500
Eldonado	15.000	Honorarioj	2.000
Ekzamenoj	1.000	Bankkostoj	1.000
Interezoj	5.000	Oficejaj iloj	5.000
Donacoj	1.000	Kotizo UEA	1.200
Diversaĵoj	2.000	UK	500
		Azia agado	1.000
		Eksteraj rilatoj	1.000
		Reprezentado	2.000
	94.200		**94.200**

* * *

Postparolo

Nia redakcio daŭre kolektas la ne plu bezonatajn IPR-numerojn, kiuj kuŝas ie en ŝrankoj aŭ subtegmentoj kaj ni sendas ilin al tiuj anoj, kiuj havas mankhavajn kolektojn. **El nia propra kolekto mankas ankoraŭ la numeroj 0/70, Speciala numero en 1973 (Szerdahelyi), Speciala numero en 1976 (Ekzamena Regularo) kaj la numeroj 1-3/79, 1-2/80 - ĉiuj numeroj el 1982-83 kaj la numero 3/86.**

Pluraj ILEI-anoj plendis ĉe mi, ke IPR atingas ilin tre malfrue, kelkfoje eĉ du monatojn post la redaktofino. En normalaj cirkonstancoj unu semajno sufiĉas por presi, kunmeti, vinkti, enkovertigi kaj ekspedi la revuon. Do, mi proponas, ke **tiuj plendu ĉe mi, kiuj proksimume unu monaton post la redaktofino ne ricevos la revuon**. Redaktofino signifas por mi tiun tagon, kiam mi printas kaj alpoŝtigas al Antverpeno la prespretajn paĝojn. Redaktofino de tiu ĉi numero estas la 6-a de novembro 1996, por la sekva numero la 15-a de januaro 1997.

Jozefo Németh, redaktoro

SEKCIESTROJ de la LIGO

Albanio: Bardhyl Mezini, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, Tirana
Argentino: Teresita Alaníz, Hipólito Yrigoyen 2578 P5 Dto 30, AR-1090 Capital Federal
Aŭstrio: Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, AT-1190 Wien
Belgio: Raymond Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende
Brazilo: Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106-010 Sao Paulo (SP)
Britio: Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 8QD
Bulgario: Kiril Velkov, D. Todorov 9, BG-3000 Vraca
Ĉeĥio: Miroslav Malovec, Bosonozská 15/10, CZ-625 00 Brno
Ĉinio: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan
Estonio: Eve Otsa, Liivalaia 30-12, EE-0001 Tallinn
Finnlando: S-ino Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, FI-69440 Lestijärvi
Francio: Fernand Micoud, 8 rue des Maures, FR-69320 Feyzin
Germanio: Michael J. Scherm, Von Thürheimstr. 47, DE-89264 Weissenhorn
Hungario: József Németh, Kilián ltp. 75/9, HU-8500 Pápa
Israelo: Murjan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv
Italio: Catina Dazzini, C.P. 22, IT-54100 Massa
Japanio: Masumi Suzuki, Inokashira 3-5-12, Mitaka-shi, Tokio, 181 Japan
Koreio: So Jin Su, Dept. de Ekonomiko, Universitato Kangnam, Kugali Kihung-up, Yongin-gun, Kyonggi-do 499-900
Kroatio: Ivan Bekavac-Basić, Kušlanova 59. HR-10000 Zagreb
Kubo: H. Jiminéz, Vista Alegre 254 e/J.B. Zayas y Luz , Caballero, Víbora, CU-11500 C. Habana
Nederlando: Hans ten Hagen, Middenweg 587, NL-1704 BH Heerhugowaard
Nordameriko: Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara, CA 93111-2521, Usono
Norvegio: Björn Thuv, Aröyveien 33, NO-3135 Torod
Portugalio: João Santos, p-a Portugala Esperanto-Asocio. Rua Dr. João Couto 6 r/c A, PT-1500 Lisboa
Rumanio: Prof. Popa Florica, Str. Eroilor 29, ap.7. RO-1900 Timisoara
Rusio: Irina Gončarova, Moloeznaja 38-10, Odincovo 2, Mosk. obl. RU-143000
Sanmarino: Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, SM-43031 San Marino.
Slovenio: Sonja Tavčar, Liminijanska 6, SI-66320 Porotoroz.
Svedio: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-24294 Hörby
Svislando: Mireille Grosjean, Rue du Temple 20., CH-2416 Les Brenets

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv. 52, Erevan
Aŭstralio: Max Wearing, 30 Westbury St, Hackney, SA 5069
Bangladeŝo: Sultan Ahamad, Factory Inspection Dept., 4 D.I.T. Avenue, Dhaka-1000
Centrafrika Respubliko: Luc Feidangai, B.P. 70, Bangui
Ĉilio: Luis A. Vera, Isabel Riquelme 7115, Pobl. C. Estrella, La Cisterna, Santiago
Hindio: Abani Halter, Jamboni, P.O. Bolpur 731204, W. Bengal
Irano: Mohammad Karamudini, P.O. Box IR-13445-747, Teheran
Islando: Loftur Melberg, Skolabraut 1, IS-220 Hafnarfjördur
Jugoslavio: Radojica Petrovic, Bul. Oslobodjenja 36, YU-32000 Cacak
Kostariko: Jorge A. Leoni de León, Apartado 7603, CR-1000 San José
Litovio: Algimantas Piliponis, Karolinisiu 3-93, LT-2044 Vilnius
Niĝerio: Godwin Oboh, University of Ekpoma Wan, Illeh Box 62, Epoma Bendel
Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1.
Pollando: p/a Silczia Esperanto-Asocio, ul. Dubois 3, Pl.-50-952 Wroclaw
Slovakio: Anton Zachariás, Sobotské námestie 6, SK-05801 Poprad.
Sud-Afriko: vakas
Tanzanio: Mramba Simba, S. L. P. 1051, Bunda Mara
Togolando: Afantchao-B.Yao, B.P. 20225 Lome
Ukrainio: Svetlana Fedotova, P.O. Kesto 88, UA-253222 Kiev
Uzbekistano: Eugeno S. Perevertajlo, Ab. kesto 140, UZ-700000 Taŝkent, CIS
Venezuelo: Prof. J.E. Bachrich, Apartado 70782, Caracas 1071 A
Zairio: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaïre)

LABORKOMISIONOJ

Didaktikaj ludoj: Georges Sossois, rue du Basson 79, BE-6001 Marcinelle, Belgio; tel. (+32 71) 43 62 05.

Ekzamenoj: prez.: Atilio Orellana Rojas (adreso, kovrilo 2). Sekretario de elementa kaj meza niveloj: d-ro Ivan Bekavac-Basic (adreso, kovrilo 3)

Eŭropa Komunumo kaj informado en pedagogiaj medioj: Raymond Wylleman

Gazetara servo kaj informado: *vakas sed pretas kunlabori:* Germain Pirlot, Steenbakkerstr. 21, BE-8400 Oostende; tel. (+32 59) 70 87 00 kaj Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, AT-1190 Wien, Aŭstrio; tel. (+43 222) 36 86 29.

Konkursoj lernejaj: Géza Kurucz, Nyíri u. 11, HU-6000 Kecskemét, Hungario.

Lerneja kontaktigo kaj statistikado: Provizore plenumata pere de *Juna amiko.*

Statuto: Rob Moerbeek kaj Hans ten Hagen

Terminologio: Maŭro La Torre, Viale Bardanzellu 117, IT-00155 Roma, Italio

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESKO: (rilatoj de reciproka informado, kat. C): Place Fontenoy, FR-75007 Paris.

Reprezentanto de ILEI: François Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, FR-75010 Paris

UEA: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.

IEI: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag.

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

La membreco inkluzivas ricevon de kvar numeroj de IPR jare. Turnu vin al via landa sekcio, kiu fiksos kotizon en via propra valuto. Por pagi rekte al la internacia ILEI, skribu al la kasisto:

Kasisto de ILEI: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby, Svedio; poŝtĝirkonto 682117-7 (Stokholmo). Membreco kostas 80 svedajn kronojn en landoj sen sekcioj kaj 100 SEK en landoj kun sekcioj (la sekcio ricevos la diferencon). Simpla abono sen membreco (por E-societoj, bibliotekoj k.s.): 30 NLG.

Pro altaj banko-kostoj, evitu bankĉekojn kaj eĉ internaciajn poŝtoĝirojn; taŭge plenumita Euroĉeko plej bonas. Alia pagmaniero estas al UEA:

UEA, Nwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, pĝk 37 89 64. UEA akceptas kredit-kartajn pagojn. Klare indiku la celon de la pago kaj la internan konton de ILEI: *ilek-a.* aŭ por *Juna amiko*: *juna-l.* Prefere informu senpere la kasiston de ILEI pri la enpago. Membreco: 20 GLD en landoj sen sekcioj, 25 GLD en landoj kun sekcioj.

Hungara ILEI-sekcio: (adreso: tria kovrilpaĝo) akceptas pagojn en hungaraj forintoj de reform-eŭropanoj por membreco kaj aliaj servoj de la Ligo.

KONTRIBUAĴOJ AL IPR

Kontribuaĵoj al IPR estu laŭeble nete tajpitaj per nigra rubando sur blanka papero kun adekvataj marĝenoj, taŭga por aŭtomata komputila enlego, aŭ surpapere prespretaj. Livero sur IBM PC-kongruaj disketoj (5,25 aŭ 3,5 colaj) bonvenas. Adreso de la redakcio sur la kovrilpaĝo. *Katalin Smidéliusz*, nia vicredaktoro, estas atingebla ankaŭ tra komputilreto. Ŝia adreso: smidik@rik.bdtf.hu. Vi povas atingi la redakcion ankaŭ telefakse. (La teĥnikajn detalojn vi trovas en la Postparolo de la 96/2-a numero de IPR.) Fakaj artikoloj prefere ampleksu 3 ĝis 8 presitajn paĝojn. Pedagogiaj novaĵoj, informoj pri edukaj aranĝoj, interŝanĝaj gazetoj kaj leteroj al la redakcio bonvenaj. Ni recenzas nur ricevitajn eldonaĵojn iel rilatantaj al edukado aŭ utilaj en instruado.